


El Popolo Ĉinio

人民中國報道



1959

ELDONAS: ĈINA ESPERANTO-LIGO



Giganta Laborejo Naskiganta

Foto de Hu Vej

Unu tago en Ruĝ-flaga Komunumo

“Dang, dang, dang. . . .”

De iu angulo de la Mengcun-a Aŭtonoma Gubernio de Huj-nacio situanta en la sudorienta parto de Hepej-provinco proksime al la Bohaj-golfo, aŭdiĝas klara sonorado, kiu ŝvebas kaj ŝvebas en la malvarma aero matena. Komenciĝas la laboro de tiu ĉi tago en la Ruĝflaga Popola Komunumo.

Apenaŭ kolektiĝis la junaj milicanoj, tiam malfermiĝas la pordego de la Hejmo de Maljunuloj, el kiu la unua elvenas Vu Guj-tan. Ĉu ankaŭ la 78-jara huj-a maljunulo iros praktiki militan ekzercadon? Ne, kun korbo sur la dorso li eliras por kolekti fekaĵojn, kio jam fariĝis lia ĉiumatena tasko. Li elektis laboron laŭ sia intereso kaj fizika forto, feliĉe pasigante siajn restantajn jarojn.

La guvernistinoj de la infanĝardeno estas purigantaj la korton por akcepti la alvenontajn infan-

ojn. “Bonan matenon, onjoj!” salutas Ding Ming-hiu kune kun kvar kamaradetoj, kaj ili tuj rapidas elsiri la balailojn el la manoj de l’ onjoj kaj komencas helpi la purigadon. Rimarkinte la agadon de l’ naivaj infanoj, la guvernistino Daj Feng-ling sentas en sia koro senliman konsolon. Tiu mezaĝulino kun sulkoplena frunto ofte ĝemis en profunda nokto en la pasinteco pro sia senideco. Sed depost kiam ŝi ekkomencis labori en la infanĝardeno, tiu griza sentimento tuj malaperis. Ŝi plene dediĉas sian patrinan amon al la dua generacio de l’ patrio. Hodiaŭ, la ĉefa leciono estos ekskurso al konstruejo. Ŝi antaŭvidas, kiel ĝojos la infanoj tuj post la publikigo de la decido, kaj ekpensante ke eble la saĝa Ding Ming-hiu kaj la petolema Ding Guo-kjuan denove elmetos serion da infancaj demandoj esploremaĵoj, ŝi nereteneble ekridas. Neatendite la rido estas rimarkita de Ding Ming-hiu, kiu ekĉirkaŭprenas ŝin kaj demandas: “Ĉu vi elkondukos nin por ekskurso, onjo? Kien?” Ŝi proksimigas sian buŝon al lia orelo kaj flustras: “Ni iros vidi domkonstruadon fare de oĉoj laboristoj!” Tuj ekbruegas la tuta ĝardeno kvazaŭ eksplodis serio da fajrokrakaĵetoj. La emocio de Daj Feng-ling ankaŭ kunfandiĝas en la ĝojo de la infanoj. Ŝi krias laŭte sed milde: “Nu, amiketoj estas tempo por vin lavi kaj matenmanĝi!”

La matena suno envenas en la hejmon de Vu Hong-jun, komunumano de la huj-nacio. Liaj du pliaĝaj filinoj—la sesjara Da-fu kaj la kvarjara Er-fu—jam ellitiĝis. Svingante la manetojn al siaj geavoj, ili krias: “Ĝis revido! Ĝis revido!” kaj iras al la infanĝardeno per si mem. La edzino de Vu tenanta en siaj brakoj la dumonatan San-fu iras ĝoje al la komuna manĝejo por matenmanĝi kune kun la aliaj membroj de la familio.

La kuiristoj de la manĝejoj jam pretiĝis por la tuta membraro la unuan bongustan manĝon hodiaŭan. Troviĝas, en la komunumo, apartaj manĝejoj por la huj-nacianoj kaj por la hancianoj kaj kombinitaj manĝejoj, kie pretiĝas manĝaĵoj por ambaŭ huj- kaj hancianoj respektive. La kuiristoj kapablas lerte pretigi el krudaj grenoj plurajn delikatajn nutraĵojn kaj prepari el kelkaj legomoj plej variajn manĝaĵojn. La membroj ilin laŭdas per jena kuajban*:

* Laŭtakte deklamata poemo.

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Kultura Gazeto
Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Adreso: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Enhavo de N-ro 3 (54), 1959

Bildo sur la kovrilo—**Riĉa Rikolto en Ĉiu Jaro** (de Vang Vej-dian)

Bazo de elektro-industrio

Ĉinio kaj Afriko

Poezio kaj pentroarto en filmo

La Printempo en Lhasa

Vangfuging—unu el la Pekinaj stratoj

Gujĝou-provinco

La delikataj metiartaĵoj el lako

Mi kaj Malgranda Huang

Rakonto pri rizo

La Maj-kvara Patriota Movado

Esperanto Marŝas

Bildo sur la dorsa kovrilo—**Ĉe Rivereto**
(Lignogravuraĵo de Vu Jan)



Kampara Infanĝardeno

Lignogravuraĵo de Zeng Ging-ĉu

La tri manĝoj — tre satigaj,
 plaĉaj pladoj — tre variaj.
 Ili — majstroj bongustigaj,
 Ni — kreantoj energiaj.

Post kontentiga matenmanĝo oni gaje sin jetas en streĉan laboron de tiu ĉi tago.

Hodiaŭ la tago estas hela kaj senventa. La ankoraŭ ne burĝonintaj branĉoj de la arboj montriĝas eksterordinare fortaj. La Ruĝflaga Popola Komunumo dividas la laborantojn en diversajn laborgrupojn; iu prizorgas tritikan kampon, alia pakas grajnigitan sterkon, ankoraŭ alia fabrikas laŭ malnova metodo kemian sterkon, la kvara kolektas fekajon, la kvina veturigas ĉarojn, la sesa sin okupas pri kromproduktado. . . . Antaŭ nelonge ekfektiviĝis sistemo de okhora dormado kaj kvarhora manĝado kaj ripozado. En la laborgrupoj ankaŭ stariĝis la produkto-respondeca sistemo de difinita respondanto, fiksita laborkvanto kaj garantiata produktado. Vu Hong-jun estas ano en la grupo por paki grajnigitan sterkon. El la dudekelkaj grupanoj la plejparto estas junuloj kaj bele vestitaj junulinoj. Por akiri pli abundan rikolton ĉijare, nature ili laboras hodiaŭ des pli energie dum tiu ĉi serena tago senventa. Tuj kiam la ĉaro alportis la grajnigitan sterkon, ĉiuj sin ĵetis al ĝi kun ŝoveliloj kaj korboj kaj ridante kaj kantante ili pakadas tiel rapide, ke en palpebruma daŭro la amasego da grajnigita sterko estas jam finpakita.

Vu Hong-jun ŝajnas iom naiva. Li estas modesta simplanima kamparano. Rigardu, kiel li ŝvitas dum la fervorega laborado! Venas tempo por ripozi. Ĉiuj aliaj interbabilas aŭ ridas brue, sed li sola sidas kviete sub iu arbo kaj elpoŝiginte

notlibron komencas seriozan lernadon. Ĉu vi pensas, ke li ne estas parolema? Kontraŭe, li estas lernanto de la filozofia kaj teknika kursoj de la ruĝuloj kaj specialistoj de la komunumo kaj samtempe instruisto de ties kleriga kurso kontraŭ analfabeteco. Nun li estas profunde enpensiĝinta pri "la rilato inter la funkcio de subjektiva aktiveco kaj la objektiva regulo", pri kio oni lekciis en la filozofia kurso.

Noktiĝas. El la klubejo ŝvebas sono de muzik-instrumentoj ludataj de la amatora ensemblo de la komunumo. La klasĉambroj de l' lernejo estas brile prilumataj. El ĉio ĉi tio oni sentas varmecon kaj intimecon. Sed hodiaŭ vespere estas alia pli ĝojiga afero. Por ke la membroj plej bone pasigi la Printrimpan Feston post la abundrikolta jaro, la partikomitato de la komunumo disdonas al la membroj hodiaŭ la laborpagon de du monatoj samtempe, sekve ĉiu ricevas duoble

Je Gian-jun:

Bazo de

MATENE mi iras sur vojo neĝkovrita por viziti la elektro-industrian bazon de Harbin-o sur la bordo de Songhua-rivero en Nordorienta Ĉinio.

La suno brilas sur la neĝo kaj la tuta vastajo fariĝas maro de lumo. Trairinte la urbocentron mi atingis la orientan antaŭurbon, kie etendiĝas la strato Anle, rekta kiel krajono. Laŭ tiu ĉi strato 5.4 kilometrojn longa de la okcidento ĝis la oriento, staras kontinuaj vicoj de fabrikoj kaj kamentubegoj. Tio estas la Harbin-a bazo de elektro-industrio, kiu konsistas el la jenaj tri fabrikoj: la Harbin-a Kaldroneg-fabriko, la Harbin-a Vaporturbina Fabriko kaj la Harbin-a Generator-fabriko. Ĉiuj ili estas tre grandaj. Por ilustriti tion sufiĉas mencii, ke la tuta loĝantaro de tiu ĉi bazo nombras 110,000. Koncerne la ekipaĵojn, tie ĉi troviĝas vertikala tornilego, alta pli ol duetaĝa domo kaj horizontala tornilego sur kiu 300-400 homoj povas stari samtempe, kaj ankaŭ kvar-cilindra rulmaŝino kapabla ruli ŝtalplatojn 5 cm. dikajn transformante ilin en tubegojn.

pli multe ol ordinare. Kiam Vu Hong-jun revenas hejmen, li firme tenas la monon en la poŝo per sia mano, pripensante kiel ĝin uzi.

La tuta familio de Vu konsistanta el ok personoj de tri generacioj okupas korton kun tri-ĉambra norda domo kaj du flankaj domoj. Ili kutimas kunsidi por interkonsiliĝi pri familiaj aferoj en la orienta domo, kie loĝas la geavoj. Krom la geedzoj Hong-jun, la geavoj ankaŭ partoprenas en laborado. Kvankam lia edzino laboris malmulte pro zorgado pri sia infano, tamen nuntempe ĉies provizo kaj laborpago jam estas fiksita, tial ĉiuj kvar ricevas sian pagon. Plie, ili ankaŭ enspezis sumon da mono post la forvendo de ŝafido, kiun ili mem bredis. Kiam tiu sumo estas aldonita, ili ja posedas sufiĉe grandan sumon, kies dispono ja indas interkonsiliĝon. Parolante ankoraŭ en familia tona, la avo insistas, ke per la dumonata enspezo ĉiu familiano havigu al si novan veston escepte de li mem. Tamen lia maljunulino estas malkontenta pri lia arbitreco. Ilia bofilino ĝentile rifuzas havigi al si se ne al la avo, dume Hong-caj, la juna frato de Hong-jun, ankaŭ intermetas

per sia opinio. O! La ĉambro ŝajnas kaldrono kun bolanta akvo. La interdisputado finiĝas per la aprobo de la propono de Hong-jun, kiu opinias, ke per parto de la mono ili aĉetu bovajon kaj ŝafajon por la Novjara Festo kaj per la restanta mono ĉiu familiano, escepte de li mem, havigu al si novan veston. Lia edzino diras post pripenso: "Vi estas nun instruisto de kontraŭ-analfabeteca kurso. Ĉu ne estas dece, ke vi havu fontoplumon?" Lia patro aldonas: "Nu, estas juste. Aĉetu unu!" Vu Hong-jun ĵetas karesan rigardon al ŝi, kiu deturnas sian kapon pro hontemo.

La nokto profundiĝas. Plena silento regas en la Hejmo de Maljunuloj. Avo Vu Guj-tan dormas tre dolĉe, eble pro laciĝo. Nur el iu fenestro de la infanĝardeno ankoraŭ brilas lamplumo, vidigante la silueton de l' diligente lernanta Daj Feng-ling. Jes, ŝi estas atente leganta la libron "La Taskoj de Infana Edukado", la unuan lecionon de la Lecionaro por Guvernistinoj, kiun ŝi alportis kun si de la provinca ĉefurbo.

Jes, la pena laborado de ili ĉiuj ja estas por krei multe pli feliĉan estontecon!

elektro-industrio


Multajn aferojn mi aŭdis pri la produktado de elektro kaj elektro-produktaj ekipaĵoj. Mi diru al vi nur unu el ili, kiu okazis antaŭ nelonge en la jaro 1954. Antaŭ tiu jaro en nia lando ankoraŭ ne estis fabriko produktanta grandtipajn elektro-ekipaĵojn, sed ĝuste en tiu jaro la registaro decidis fabriki kompletan da 6000-kilovataj elektroproduktiloj t. e. generatoro kun vaporturbino kaj kaldronego. Por plenumi tiun taskon organiziĝis la kunlaboro de pli ol dek provincoj kaj urboj, kaj 122 fabrikoj partoprenis en ĝia produktado sub la subteno de kvin industriaj ministrejoj de la Centra Registaro. Kaj la kompleta ekipaĵo estis fin-

fabrikita nur post du jaroj. Tiu ekipaĵo nun funkcias en Huajnan-a Elektrejo. Sukceso estis atingita, kaj oni ĝojas pro tio. Sed kiel peniga laboro! La 6000-kv-a ekipaĵo konsistas el pli ol 100,000 maŝinpecoj. Iuj fabrikoj kapablas produkti nur po unu-du specojn el ili. Kiom da tempo estis uzata por transporti ilin el la pli ol 100 fabrikoj al la muntejo!

Sed nun, en unu sama strato, ne pli ol 5.4 kilometrojn longa produktiĝas kaj kaldronegoj kaj

Laborejo de la Harbina Generator-fabriko

Foto: Li Gi-lu



vapor-turbinoj kaj generatoroj, kiujn oni povas facile kunmeti en kompletojn. Tiu trio de fabrikoj nun kapablas produkti ne nur ekipaĵojn de 6000 kv. aŭ 10,000 kv, sed jam elfabrikis ekipaĵojn de 50,000 kv. Ekipaĵoj pli grandaj estas nun aŭ projektataj aŭ en fabrikado. Pri la produktado de hidroelektraj ekipaĵoj, oni povas menciigi, ke jam produktiĝis elektroproduktaj ekipaĵoj kun kapacito de 72,500 kv. Kaj tiuj de 210,000-kv-a kapacito estas en projektado.

Enirinte la laborejon de akvoturbinoj de la generator-fabriko, oni vidas aŭtomobilojn kaj trajnojn tien kaj reen kurantajn en la vasta fabrikejo. Kompare kun la apude starantaj maŝinejoj, ili aspektas kvazaŭ etaj azenoj, Starante tie, mi ne sciis pri kio pensas la konstruantoj de la Hidroelektra Stacio sur Hin-an rivero, kaj pri kio pensas la fervoraj konstruantoj de la Ĉunkina Elektrejo en Siĉuan-provinco, kaj pri kio pensas la konstruantoj de Liaŭning-a Elektrejo, sed la laboristoj de Anle-strato en Harbino ĉiam pripensas pri ili.

Je la fino de novembro lastjara, Harbino estis jam dike kovrita de neĝo. En la manĝejo de la Generator-fabriko, la manĝaĵoj dissendis sian bonodoron. La laboristoj, maĉante panon, kalkulis per siaj fingroj. Ili ne kalkulis kiom da manĝibiletoj ili devas aĉeti, nek kalkulis kiom da mono ili devas elpreni el banko por aĉeti novan felĉapon. Ili kalkulis pri io gravega: finfabriki hidroelektran generatoron de 72,500 kv. en 30 tagoj. Tio estas kolosaĵo, por kies transporto pli ol 20 vagonoj estas bezonataj. Tio estas nov-jara donaco de la laboristoj de la generatora fabriko al la laboristoj de Hin-an-rivera Elektrejo, ne nur al ili, sed ankaŭ al la loĝantoj de Ŝanhajo, Hangĝoŭ kaj Nankino en la elektro-reto de Hin-an-rivera Elektrejo.

En la pasinteco, la laboristoj fabrikis hidroelektrajn generatorojn malgrand-tipajn, el kiuj la plej granda havis kapaciton de nur 15,000 kv. Sed tiu de la nuna estas 72,500 kv. De 15,000 kv. al 72,500 kv., same kiel de element-lernejaneco al universitato-studenteco, ja ne estas simpla afero. Kaj nun oni devas ĝin finfabriki eĉ en 30 tagoj.

Por subteni Ĉunkin-on, la malproksiman monturbon en Siĉuan-provinco sur Gialing-rivero, la elektraj lampoj en la oficejo de la direktoro de la Harbin-a Kaldroneg-fabriko lumis tra kelkaj noktoj. Oni lumigis la lampojn ne por kartoludi nek por babiladi, sed por trovi metodon havigi al la Ĉunkin-a Elektrejo la bezonatajn ekipaĵojn kelkmonate pli frue ol planite.

La distanco inter Harbin-o kaj Ĉunkin-o estas kelkaj miloj da kilometroj. Eble la geknaboj en

Ĉunkin-aj infanĝardenoj ankoraŭ ne ellernis de la guvernistinoj kiel prononci la vorton Harbin-o, sed ĉi tie sur la strato Anle miloj da laboristoj elpensis multajn bonajn ideojn por la Ĉunkinanoj.

La kaldronego de la Ĉunkina Elektrejo antaŭe havis kapaciton por 50,000-kv-a generatoro, kaj 1500 tunoj da ŝtalo estis bezonataj por ĝin fabrikigi. Nun dank' al la teknika novigo fare de la laboristoj de la kaldroneg-fabriko, la elfabrikita kaldronego atingis kapaciton por 60,000 kv. dum la bezonata ŝtalo malpliĝis je 2/3. Kion signifas la pliigo de potenco je 10,000 kv.? Tio signifas pliigon de 2 milionoj da tunoj da vaporo, kiu transformite en elektran energion kapablas anstataŭi la laboron de 70,000 portistoj. Sed tiu bona ideo ne estis tuj elpensita. Por pligrandigi la kapaciton, oni analizis la akvon de Gialing-rivero, studis la ŝanĝon de temperaturo tra la kvar sezonoj en Ĉunkino kaj analizis la karbon produktatan en Siĉuan. . . tiel la laboristoj zorgas pri la intereso de la Ĉunkinanoj. Kiam la laboristoj de la Anŝan-a Ŝtal-uzino hejmeniris en puraj vestoj, kiam la laboristoj de la Laŭhutaj-karbominejo en Fuŝun sidis en la saniga ĉambro ĝuante sunbanon, la Harbina Vaporturbina Fabriko sukcesis provprodukti sian 50,000-kv-an vaporturbinon. Ĝi estas destinita por la Liaŭning-a Elektrejo, estante samtempe la unua pez-tipa vapor-turbino fabrikita de Ĉinio. Kombinate kun kaldronego kaj generatoro ĝi povas lumigi tutan urbegon kun 5,000,000 loĝantoj.

Ĉi tie, okazis multaj festkunvenoj por celebri la novajn atingojn kaj sukcesojn. Meze de varmega aplaŭdado, oni ĉiam prezentas la unuan bukedon al la amikoj el Sovetunio. Ĝi estas bukedo esprimanta dankon. Oni neniam forgesos, ke estas nia amiko kaj frato — la popolo de Sovetunio, kiu donas al ni plej sinceran helpon.

KORAN DANKON


al ĉiuj gesamideanoj, kiuj sendis al ni salutleteron okaze de la Maj-unua Festo.

Ĉina Esperanto-Ligo

KURSO DE ĈINA LINGVO

ne aperas en tiu ĉi n-ro pro manko de spaco.

La redakcio de E.P.Ĉ.



D-ro W. E. B. Du Bois parolas en la Pekina Universitato

Foto: Ĝeng Hiaŭ-ĝen

D-ro W. E. B. Du Bois:

ĈINIO KAJ AFRIKO

— Voĉo de usonano —

D-ro W. E. B. Du Bois, konata negra erudito el Usono, gvidanto de la pornegra movado kaj membro de la Monda Packonsilantaro, vizitante Ĉinion kun sia edzino verkistino Shirley Graham, alparolis pli ol 1000 fakultatajn membrojn kaj studentojn en la Pekina Universitato la 23-an de februaro, lia 91-a naskiĝtago. Lian paroladon, kiun ni konsideras voĉo de usonanoj vere pacamantaj, ni prezentas jene al niaj legantoj.

— La Red.

DANK' al la afableco de la registaro de 680 milionaj popolanoj de la Ĉina Popola Respubliko, mi havas okazon paroli, en mia 91-a naskiĝtago, al la ĉina kaj afrikaj popoloj kaj, pere de ili, al la tuta mondo.

Permesu al mi hurai kaj saluti al vi, al la landoj kie loĝas la flava kaj nigra raso! Permesu al mi hurai al la homaro!

Mi parolas ne per ia aŭtoritato, ne per aĝo nek per rango. Mi havas nek ŝtatan oficon, nek riĉaĵon. La unika objekto kiun mi posedas estas mia animo, kies posedantecon mi havas eĉ en mia propra lando. Dum preskaŭ 100 jaroj mi estas nenio pli ol "nigrulo". Sur tiu ĉi bazo kaj nur per tio mi kuraĝas paroli, mi kuraĝas averti.

Post longaj jarcentoj, Ĉinio fine stariĝis kaj saltas antaŭen. Afriko, leviĝu! Rektigu vian

talion! Kuraĝe parolu, kuraĝe pensu kaj kuraĝe agu! Forjetu la Okcidenton, la sklavecon kaj la humilon kiujn vi suferadis dum la pasintaj 500 jaroj, kaj vin turnu fronte al la leviĝanta suno! Rigardu la popolon, plej grandnombrian sur tiu ĉi antikva tero, kiu jam rompintis siajn katenojn, ne per fanfaronon kaj parado, nek per mensogo kaj militaj atingoj, sed per longtempa pacienco, suferado kaj malfacila sindona penado, batalado zigzagvoja, marŝas paŝon post paŝo al la brila suno. Ĝi celas fari la homojn noblajn kaj liberajn. Kiajn homojn? Ne nur la mandarenojn, sed inkluzive la mandarenojn; ne nur la riĉulojn, nek ekskluzive la riĉulojn; ne nur la instruitulojn, sed ankaŭ tiujn gvidatajn de la scioj. Ĝia fina celo estas ke neniu plu suferu, malsanu aŭ restu malklera; ke ĉiu, ĉu plej simpla laboristo, ĉu ido de imperiestro, estu

sata kaj instruita kaj ricevu kuracadon; ke aperu sur la tero nacio, ne nur libera kaj sana sed ankaŭ edukita.




Oni diris al vi, mia Afriko, mia Afriko en Afriko kaj viaj gefiloj kaj genepoj en landoj transmaraj, oni diris al vi, kaj iliaj vortoj estas enbatitaj en vian animon per bastonoj kaj vipoj, kaj vi ĝin kredas mem sen ia dubo, ke tio estas nebla, ke la homoj povas leviĝi nur per reciproka tretado, trompo kaj mortigo; ke nur uzante kiel antaŭpordan maton la malestimatajn, mortantajn kaj putriĝintajn homojn, angla aristokrato, franca kultura elito aŭ Usona milionulo povas edukiĝi kaj kreski. Tio estas mensogego, antikva mensogego disvastigita de la eklezio kaj registaro, pastroj kaj historiistoj, kaj kredita de stultuloj kaj malkuraĝuloj, same kiel de la subpremataj kaj esperon perdintaj gefiloj.

Parolu, Ĉinio, diru vian veron al Afriko kaj al la mondo. Kiu popolo estas tiel malrespektita kiel vi? Kiu estas pli ofendita ol vi? Rememoru, kiel angloj sinjore ĵetis la rikŝan monon sur la teron por ne malpurigi sian manon tuŝante tiun de la rikŝokulio. Ne forgesu la tempon, kiam en

Ŝanhajo neniu ĉino kuraĝis eniri parkon, kies konstruadon li pagis. Ĉion ĉi tion diru al Afriko, ĉar la vasta Afriko jam staras sur nova pozicio kaj elmetas al si demandon laŭ nova vido kaj nova penso: "Kie ni estas kaj kial?" Kiel respondas la okcidentaj sirenoj? Britio demagogas, Francio tromplogas. Kaj Usono? Mia Usono, kie miaj antaŭuloj kaj posteuloj el ok generacioj vivis kaj vivas, krias plej laŭte, promesante liberecon al Afriko nur se ĝi enlasas Usonajn investojn. Vin gardu, Afriko. Usono marĉandas por via animo. Usono volas vin kredigi nun, ke ĝi liberigis viajn nepojn, ke afrik-devenaj usonanoj estas plenaj civitanoj de Usono, egale traktataj, juste pagataj, promociataj pro sia merito kaj kun libereco lerni, perlabori kaj vojaĝi tra la mondo. Tio estas malvera. Kelkaj el ni estas proksimaj al libereco, kelkaj proksimiĝas al egaleco kun la blankuloj, kelkaj ricevas edukadon, sed tio kostas ofte sklavigon de la menso, mistordon de la vero kaj subpremadon de nia propra popolo.

El la 18 milionoj da afrikaj usonanoj, 12 milionoj restas ankoraŭ dua-klasaj civitanoj de Usono, servutuloj en farmbieno, malalte pagataj

SUKCESE PLENUMIĜIS LA UNUA KVINJARA KAJ LA DUA (1958—1962) KOMEN






laboristoj en industrio kaj subpremataj sindikatanoj. La plejparto de la Usonaj negroj ne ĝuas voĉdonrajton. Eĉ la 6 milionoj da leviĝintaj negroj povas esti iam ajn insultataj kaj malegale traktataj. Sed tio, Afriko, rilatas nur al viaj idoj, kaj ne al vi mem. Mi iam rigardis vin afrikanoj infanoj, kiujn ni edukitaj Afrikaj usonanoj volas konduki al la libereco. Mi eraris. Ni ne povis konduki nin mem, des pli ne vin. Hodiaŭ mi vidas, ke vi starigis sub via propra konduko, gvidataj de via propra penso. Afriko ne bezonas almozpeti de Sovetio aŭ Ĉinio, nek de Francio, Britio aŭ Usono. Ĝi bezonas amikecon kaj simpatian, kaj neniu nacio povas ilin doni pli bone ol Ĉinio al la Nigra Kontinento. Ili estu donataj libere kaj malavare! Vizitu ĉinoj al Afriko, sendu tien siajn kuracistojn, artistojn kaj verkistojn. Sendu Afriko siajn studentojn kaj sciosercantojn al Ĉinio. En tiu ĉi mondo Afriko ne trovas objekton pli riĉan, fonton de scioj pli promesan.

Aliflanke, Afriko, estu singardema kontraŭ la Okcidento. La nova Brita Okcidentindia Federacio ne estas organizformo demokrata kaj progresiva, sed ruzajo kun celo submeti tiujn insulojn sub la

kontrolo de britaj kaj Usonaj regantoj. Hajtio agonias sub la riĉaj Hajtiaj investistoj kiuj sklavigas tieajn kamparanojn per Usona mono. Kubo estas montranta, kiel suferas la Centra kaj Suda Ameriko subpremata de Usonaj grandaj entreprenoj. La Usona laboristo ne ĉiam tion komprenas. Li havas altan salajron kaj vivas komforte. Por ne perdi tion, li preferas resti en la stato de servisto de la industria ekspluato tiom longe kiam oni konservas lian salajron. Liaj sindikataj gvidantoj reprezentas ekspluatanton anstataŭ la batalon kontraŭ la ekspluato de laboro fare de privata kapitalo. Tiuj ĉi du specoj da ekspluatantoj malpacigiĝas nur kiam unu alproprigas ekscese grandan proporcion de la rabajoj. Tion bone scias Ĉinio. Afriko devas ĝin kompreni. La Usona negro tion ne komprenas ĝis nun ankoraŭ.

Mi estas surprizita, ke nun amase sinpuŝas en Afrikon la tiel nomataj amikoj. Inter ili sin trovas negraj usonanoj, kiuj intencas akiri profiton el via laboro, kaj blankaj usonanoj, kiuj intencas fari uzurajn investojn por vin ligi kaj sklavigi eterne sub la grandaj entreprenoj, kiel tio okazas en la Proksima Oriento, kaj ankaŭ kiel tio kion

A PLANO DE EKONOMIA KONSTRUADO CIGIS PER ANTAŬEN-SALTEGO



oni klopodas forskui en Suda Ameriko. Ĝuste por tiu ĉi celo, ili tentas viajn gvidantojn, subaĉetas viajn junajn instruitulojn kaj armas viajn soldatojn. Kion faru do Afriko? Unue, komprenu! Komprenu ke estas vastaj amasoj, sin liberigantaj de la salajra sklaveco, dum la privata kapitalo en Britio, Francio, kaj nun en Usono, penas bazi la civilizacion kaj komforton de areto da personoj sur la laboro, malsano kaj malklereco de la vastaj amasoj. Tion komprenu, kaj kompreno venas de propraj spertoj. En kontraktado kun Usono, Francio kaj Britio, nenio bona rezultas al vi. Nun kontaktiĝu kun Sovetio, ĝiaj aliancaj landoj, kaj precipe kun Ĉinio! Ĉinio estas la karno de via karno kaj sango de via sango. Ĝi estas ankaŭ lando kolorrasa, kaj komprenas, kion devas suferi kolorhaŭtulo en la nuntempa mondo. Sed Ĉinio scias ankoraŭ pli, multe pli ol ĉi tion: ĝi scias kion ĝi devas fari. Kia ajn estu la kalumnio de Usono pri Ĉinio, tiu lasta restas ĉiam kun kapo levita. Ĉinio povas fari mem maŝinojn, aŭ ĝi simple iras sen maŝino, kiam Usono rifuzas vendi al ĝi siajn manufakturaĵojn, kvankam tion farante Usono kompromitas sian industrion kaj plimultigas siajn senlaborulojn. Ĉinio ne bezonas Usonajn nek britajn misiistojn por instrui al ĝi religion kaj timigi ĝin per rakontoj pri la infero. Ĉinio vivis en infero tro longe kaj kredas nur je ĉiela paradizo kiun ĝi mem kreas. Tion ĝi estas faranta.

Venu al Ĉinio, Afriko, kaj rigardu ĉie, de loko al loko. Invitu Afrikon, Ĉinio! Vi povos multon instrui per nura ekmontro. Tie estas maljunulino kiu laboras sur la strato. Sed ŝi estas ĝoja, ŝi ne havas timon. Ŝiaj infanoj lernas en lernejo, kiu estas tre bona. Se ŝi malsaniĝas, la hospitalo senpage ŝin prizorgas. Ŝi havas pagatan libertempon ĉiujare. Se ŝi mortos kaj estos enterigita, oni ne postulos de ŝia familio imposton por riĉigi iun enterigiston.

Afriko povas respondi: multajn el tiuj aferoj ni jam faris; niaj triboj ankaŭ havas similajn publikajn servojn. Tre bone, viaj triboj do daŭrigu kaj plivastigu tiun laboron! Kion Afriko devas kompreni estas tio, kion Ĉinio komprenas, ke estas pli ol stulto meti la popolan edukadon sub la kontrolon de tiuj, kiuj ne interesiĝas pri la progreso de la popolo, sed nur ĝin utiligas por prosperegi sin. Estas erare lasi la Londonan Universitaton kontroli la Ghanan Universitaton. Estas erare lasi la katolikan eklezion gvidi la edukadon de la nigraj kongo-anoj. Estis erare ankaŭ ke la ĉina alta edukado estis kontrolata de la protestantaj eklezioj subtenataj de la brita kaj Usona industrioj. Sovetio superas la tutan mondon en sia ĝenerala kaj alta edukado, ĉar ekde la komenco ĝi starigis por si propran kompletan eduksistemon. La esenco

de la revolucio en Sovetio, Ĉinio kaj ĉiuj aliaj t.n. fer-kurtenaj landoj ne estas la perforto, kiu akompanis la revolucion, same kiel la esenco de la Usona revolucio kontraŭ Britio ne estis la malsato de la soldatoj en Valo Forge. La vera revolucio konsistas en tio, ke la nacio ekkonas la fakton, ke ekde nun la ĉefa celo de la nacio estas la bono de la vastaj popolamasoj kaj ne tio de la malmultaj fortunuloj. La registaro estas por la progreso de la popolo kaj ne por la komforto de aro da aristokratoj. La celo de la industrio estas la bono de la laboristaro kaj ne la profito de la posedantoj. La celo de la kulturo estas klerigo de la vastaj laboristaj amasoj kaj ne tio de areto da intelektaj aristokratoj. Kaj la komunismaj landoj kredas ke tia kulturado de la popolamasoj malkovros pli da talento kaj genio por servi la ŝtaton ol kiom provizis iu ajn malvasta aristokratio. La kuranta historio de Sovetio kaj Ĉinio ĉiutage evidentigas la pravecon de tiu kredo.

Sekve, Afriko, ne akceptu la investon de la Okcidento, kiam vi povas tion eviti. Ne pruntu kapitalon de Britio, Francio kaj Usono, se vi nur povas ĝin akiri en justaj kondiĉoj de Sovetio kaj Ĉinio. Tio ne estas politiko sed simpla prudento. Tio



Gu Gong:

Poezio kaj

— Pri la vojaĝfilmoj p

RIGARDINTE la serion da mallongaj filmoj, nome “Vintro”, “Frua Printempo” kaj “Printempa Festo”, kiujn filmis s-ro J. Ivens, mi sentas grandan ĝojon. Pri kio mi ĝojas? Nu, bonvole rigardu: La filmoj estas faritaj de fremdulo, tamen en ili troviĝas multaj bildoj tre similaj al nia ĉina pentraĵo. Ekzemple la ĉevaljunganto en neĝblovado, la ŝafidoj ĉirkaŭ la ŝafino, la flosantaj boatoj sur la nebula rivero, la branĉo da florbutonoj aŭ bambuaro . . . Ekvidinte tiujn bildojn, oni tuj ekpensas pri la akvarelo de nia lando. Krome, troviĝas ankaŭ multaj bildoj kiuj memorigas nin pri ĉinaj popolkantoj. Ekz. la aroj da ĉevaloj sur la paŝtejo; la dragŝipo sur Taj-lago, la svingiĝantaj ŝoveliloj super la konstruejo de akvokonservejo, la provizora scenejo por operludo en la kamparo dum la Printempa Festo ktp. . . Ĉu ĉio ĉi tio ne estas tre similaj al poemoj nacistilaj de nia lando? Ĉi tiuj filmoj ne nur karakterizitaj de ĉinaj poezio kaj pentraĵoj, sed krome akom-

estas lerno el sperto. Tio estas fido al la amikoj kaj singardo kontraŭ la malamikoj.

Ne estu trompita! Iuj volas ŝanĝi vian vivmanieron kaj riĉigi malmultajn el viaj samlandanoj je la kosto de vastaj amasoj laboristaj, pli kaj pli ilin malriĉigi, malfortigi, senigi je lernejoj, por ke malmultaj negroj havu aŭtomobilojn. Ne estu trompita!

Afriko, jen kuŝas la vera danĝero kiun vi devas eviti, alie, vi refalos en la abismon de sklaveco el kiu vi estas elsaltanta. Tio, kion mi postulas de vi, estas nur la kuraĝo ekkoni kaj observi, kia ŝanĝo okazos en tiu ĉi malnova kaj lacigita mondo kaj kompreni la amplekson kaj profundecon de ĝia renaskiĝo kaj la esperon kiu flamas tie sur la montoj.

Vizitu Sovetion kaj Ĉinion. Lernu viaj gejunuloj la rusan kaj ĉinan lingvojn. Unuiĝu en la nova mondo kaj lasu la malnovan pereji aŭ renaskiĝi en nova espero kaj perspektivo.

Aŭskultu la antikvan hebrean profeton de komunismo: "Ho! ĉiu kiu soifas venu al la akvo! Venu, aĉetu kaj manĝu, sen pago kaj sen prezo!"

Ankoraŭfoje, Ĉinio kaj Afriko, huraon kaj saluton al vi!



pentroarto en filmo

Ĉinio de s-ro J. Ivens —

panataj de tipa ĉina muziko, pibao, (la ĉina gitaro) huĉino, (la ĉina violono) despli riĉiĝas je koloroj de nia popola arto.

Tio ja estas atingajo malfacila! Evidente s-ro Ivens iam serioze studis niajn pentraĵojn, poezion kaj teatraĵojn. Alie, kiel li povus filmi la vintron de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio tiel viveca? Kiel li povus filmi la pejzaĝon de Taj-lago tiel ĉarma? Kiel li povus filmi la vilaĝojn en la Sudo de Jangzi-rivero dum la Printempa Festo tiel vigla kaj ĝojplena? . . .

Ne pripentri alian popolon per koloro plaĉa al si mem, sed kolorigi sian verkon per la kristaloj de la saĝo de alia popolo — jen vera internaciismo en la arta kreado.

Tiu serio da filmoj de s-ro Ivens plene manifestis lian sinceran amikecon kaj profundan prizorgon al la ĉina popolo. Alie, li ne kurus al paŝtejoj en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio spite la froston de 40 gradoj C. sub la nulo;

alie li ne rapidus al konstruejo de akvokonservejo por filmi la viglegan scenon; alie, li ne enirus en kuirejon de ordinara kamparano por observi kiel kamparanino fritas fiŝon kaj kuiras manĝaĵojn por la Novjaro; alie, li ne rigardus kun tiom da intereso al la metiarto de sukerfiguristo al la petardoj bruligataj de infanoj, al la prezentado de laboristo kaj knabineto sur la scenejo . . . Dum sia hasta vojaĝo li vidis la profundon en la koro de la ĉina popolo — la diligentecon, la kuraĝecon kaj la optimismon. De la hufbruo de ĉevaloj antaŭenkurantaj, neĝon tretantaj, li antaŭvidis la impeton de la ĉina popolo, sur la plugataj kampoj printempaj li jam aŭdis la tambursonon de antaŭensaltego, kaj plie, el la jubilado de la infanoj dum la Printempa Festo li vidis la feliĉon de la ĉina popolo — la feliĉo ne nur montriĝas en la vestoj, ĉapoj aŭ tualetoj, sed saturis ĉies mienojn kaj korojn kaj tiel naskiĝis la kortuŝa filmo mallonga "Frua Printempo".

1958 estis jaro, en kiu la ĉina popolo konstruis sian patrion kun mirinda energio, jaro en kiu la ĉina popolo kreis milojn da mirakloj, jaro en kiu la ĉina popolo flugpaŝe marŝis antaŭen for de la malnovo. Forpasiginte la jaron, nun rigardante tiun ĉi filmon, eble oni ekpensas: Kiom bone estus, se s-ro Ivens estus filminta ankaŭ niajn popolajn komunumojn! Kiom bone estus, se li filmus la ŝtalproduktadon de la tuta popolo! Kiom bone estus, se li filmus niajn "satelitojn" en grenproduktado! Kiom bone estus, se li filmus niajn sennombrajn novajn kreaĵojn! Kiom bone estus, se . . . Jes, en tiuj ĉi mallongaj filmoj s-ro Ivens nur filmis pri la tempo, kiam nia impetego de 1958 estis faronta la unuan paŝon. Sed mi kredas, ke se s-ro Ivens refoje venos al Ĉinio li certe kontentigos ĉi tiujn dezirojn de ni. Tiam li certe registros en siaj novaj filmoj la pli heroajn paŝojn kaj la pli bravajn kantojn de la ĉina popolo.

Bela Printempo

Hia Tong-guang



La Printempo en Lhasa

Korespondanto de Hinhua-novaĵagentejo

POST la unuafoja tondrado printempa, degelis la neĝo kovranta la montojn ĉirkaŭ Lhasa; novaj burĝonoj elkreskis sur la Tang-dinastia saliko antaŭ la pordo de Culakang-templo; aroj de sovaĝaj anseroj kaj grupoj ŝvebadas super la ebenaĵo de Lhasa. Printempo venas al la fama antikva urbo.

Matene, amasoj da kamparanoj kaj paŝtistoj el la ĉirkaŭurbo amase venas en la urbon kun siaj azenetoj por vendi bovfeĵojn* kaj grenon, gelernantoj iras 3-5-oje al la lernejo, leterportistoj biciklante disportas la ĵus aperintajn ĵurnalojn al la abonantoj: la stratoj viglas de la senĉese tien kaj ĉitien irantaj homoj kaj veturiloj. Post la frakaso de la ribelo de la estinta Loka Registaro de Tibeto kaj la reakciuloj de la supera kasto, la antikva urbo Lhasa rapide regajnis sian bonordon.

La oficejo de la Milita Kontrola Komitato estas senĉese vizitata de urbanoj: iuj ricevis de ĝi

Industrio disvolviĝas en Tibeto sub la helpado de la Centra Popola Registaro. La bildo montras, ke tibetanino laboras en la elektrejo de Lhasa.

Foto: Ĵen Jong-ĝaŭ



nove asignitajn laborojn, aliaj sin registris por laborposteno. La laborantoj de la komitato vizitadas domon post domo la loĝantojn por klarigi al ili la politikon de la Centra Registaro, doni necesajn helpojn al urbanoj damaĝitaj de la ribelo kaj ankaŭ al la malriĉuloj.

Nova paĝo en la historio de Tibeto

En ora sunbrilo baniĝas la ora tegmento de la oficeja domo de la Prepara Komitato por la Aŭtonoma Regiono de Tibeto en Ŝurcir Lingka antaŭ la Potala-palaco. En la lastaj tagoj, tie ĉi regas eksterordinara vigeleco. Sur la ŝoseo al la domo tien kaj reen kuradas aŭtomobiloj, motorcikloj kaj bicikloj. Por plenumi la dekreton de la Ŝtata Konsilo publikitan je la 28-a de marto. Panĉen Erdeni, la aganta ĉefkomitatano de la Prepara Komitato venis de Ŝjekaz al Lhasa je la 5-a de aprilo kaj prezidis la unuan plenan kunvenon de la Prepara Komitato por funkcii kiel loka registaro.

Ĝi estis la plej okupata tago de la Prepara Komitato. Matene, kiam la sunradioj apenaŭ ek-tuŝis la verdajn arbopintojn en Ŝurcir Lingka, jam arope alvenis al ĝi la komitatanoj. La 3-an posttagmeze, la aganta ĉefkomitatano Panĉen Erdeni, vicĉefkomitatanoj Ĝang Guo-hua kaj Ngapo Ngavang-ĝigme kune kun ĉiuj komitatanoj interkonsiliĝis kaj faris rezolucion pri plenumado de la Dekreto de la Ŝtata Konsilo publikita je la 28-a de marto. Tiu ĉi rezolucio skribis, post la likvido de la ribelo en Lhasa, alian novan paĝon en la historio de Tibeto.

La komitatanoj kunvenis kaj libere diris kion ili volis kun tia plezuro kaj fido al la bela estonteco, kiam manifestis ankaŭ la vastaj monaĥaro kaj laikaro de Lhasa. La 7-an posttagmeze, kiam Panĉen Erdeni iris al Culakang-templo kaj Ramoĉe-templo por preĝado, miloj da lhasa-anoj svarmis sur la stratoj por lin saluti respektige. La popolo subtenas lin funkcii kiel ĉefkomitatano de la Prepara Komitato anstataŭ Dalhaj-lamao dum tiu ĉi lasta estas perforte tenata de la naciperfiduloj, kaj kredas, ke li povas unuigi la tibetanojn por fari multajn bonojn por ili.

La aspekto de la kunveno de la Prepara Komitato forte refutis la senhontajn kalumniojn

*Tibetanoj prenas bovfeĵojn por hejtado.

de la reakcia kliko de la supera kasto de Tibeto kaj la imperiistoj, ke la Ĉina Kompartio kaj la Popola Liberiga Armeo "detruas religion" en Tibeto. Multaj el la komitatanoj estas vivaj budaoj kaj kampo-oj** en pastra robo. Je la 8-a de aprilo, Gadanĉipa, la heredanto de Congkapa, la kreinto de la flava lamaismo, la unuan fojon eniris la oficejon de la komitato kiel komitatano. Kiam li ricevis la kvin pridiskutotajn proponojn en Tibeta lingvo de la laborantoj ĉe la sinanoncejo, la blankhara Gadanĉipa ridis kore kaj riverencadis al la laborantoj pro emociiĝo. Li kunportis la proponojn al la ripozejo por legi detale, kaj legante li diris al aliaj komitatanoj: "Kiel mi ĝojas hodiaŭ!" Gadanĉipa havis parolon en la kunveno, kaj post la kunveno li diris al ĵurnalisto: "La Ĉina Komunista Partio ne nur respektas la liberon en religia kredo en Tibeto, sed ankaŭ havigas al religiuloj altajn poziciojn en politiko. Ekde nun, krom laŭtlegado de la sutro, mi nepre klopodos por bone plenumi la laboron de la prepara komitato."

La Centra Registaro zorgas pri la tibetanoj

En iu grupa kunveno de loĝantoj kunvokita de labortrupo de la Milita Kontrola Komitato de Lhasa, iu pentristo diris emocie ricevinte laborpostenon: "La Centra Registaro ja estas vere zorgema pri ni tibetanoj."

Li diris, ke la aferoj faritaj de la Centra Popola Registaro kaj la Popola Liberiga Armeo en la pasintaj ok jaroj depost la paca liberiĝo de Tibeto, kiel ekzemple fondo de lernejoj, popola hospitalo, distribuo de sen-intereza kredita prunto

** Altranga lama-a oficisto.



Batalantoj de la Popola Liberiga Armeo helpas tibetanojn en rikoltado Foto: Ĝang Ĝeng-mo


al la tibetanoj ktp., estas senescepte por la bono de la tibetanoj. La estinta Loka Registaro kaj la reakciularo de la supera kasto de Tibeto, ne nur peladis la tibetanojn al servutaj laboroj por ili, sed ankaŭ organizis ribelojn damaĝante kaj mi-

zerigante la tibetanojn. Post la subpremo de la ribelo en Lhasa, la Centra Popola Registaro liveris al ni ĝustatempajn helpojn kaj havigis al senlaboruloj laborpostenojn.

Jubilado en la verdejo

El la verdejo apud la Potalalaco disaŭdiĝas de tempo al tempo klara sono de sonorilego. Pli ol mil geknaboj de Tibet- kaj huj-nacioj rekomencis ĉi tie sian lernejan vivon.

Plej viglaj estas nun la junpioniroj, kiujn ofte batis



Sur la Okangula Strato

Pentris Niu Ven

la ribeluloj. Kantante la kanton de Junpioniroj kun alte levita standardo de sia organizo, la pioniroj gaje pasigas ĉi tie sian pioniran tagon. La 14-jara knabo Lobsang, kies kruro estis vundita de ribeluloj antaŭ ne longe pro portado de la ruĝa koltuko, diras kun ĝojo: "La aĉuloj ne plu povos nin turmenti. Ekde nun neniuj povos nin deteni de portado de la ruĝa koltuko." Cevang Ĉime, la unua junpioniro en Tibeto, kiun la ribeluloj minacadis, ke li forjetu la ruĝan koltukon kaj ekŝigu de la organizo, ekkomenĉis propagandon kaj denuncon pri la krimoj de la ribeluloj tuj post la subpremo de la ribelo en Lhasa.

Sur la Okangula Strato

Ree vigliĝas kiel ordinare la Okangula Strato, la plej prospera strato en Lhasa: el ledaj-butikoj disportiĝasodoro de tanita ledo, el butikoj de kupraĵoj kaj arĝentaĵoj disaŭdiĝas tintadoj; kolportistaj standoj viciĝas unu apud alia laŭ la strato kaj sur la standoj de librovendistoj montriĝas sutroj kaj noveloj en la Tibeta lingvo. La vendejoj, kiuj tenis siajn pordojn fermitaj dum la ribelo, nun denove malfermis ilin kaj la fenestrojn kaj bonorde ekspozas ankaŭ siajn valorajn komercaĵojn al la klientoj. Precipe homplena estas la Naci-vara Magazeno de la Komerca Kompanio de Tibeto. Komercestoj pogrande aĉetas de ĝi teon kaj kamparanoj kaj paŝtistoj elektas tie varojn laŭ sia gusto. Ĉe la Legom-bazaro, svarmiĝas babilantaj virinoj. En tiu ĉi jaro, spinaco,

La Milita Kontrola Komitato de Lhasa disdonas grenon al malriĉuloj

Foto: Ĵen Jong-ĝaŭ



printempa brasiko, ajlo kaj zingibro venas pli frue en la vendejojn kaj kostas malpli multe ol antaŭe.

La disvendaj kvantoj de multaj butikoj pli-grandiĝis ol antaŭ la ribelo. "Antaŭ la ribelo," diris Ĵinĉintutan, Tibeta komercisto, "la ribeluloj malhelpadis kaj rabadis la vojaĝantojn, tial tre malmultaj el la kamparanoj kaj paŝtistoj venis al la urbo, kaj la butikoj ne kuraĝis komercadi publike sub la minaco de la ribeluloj. Nun la hejmen revenintaj kamparanoj kaj paŝtistoj ne plu havas timon kaj povas iradi tute libere, tial pligrandiĝas la disvenda kvanto de teo, ŝtofo kaj aliaj ĉiutagaj bezonaĵoj."

Rekonstrui Lhasa-n plibela

Pliviveca Lhasa fariĝas. Grandaj kvantoj da ligno por konstruado alportiĝas de la arbaroj apud Ĉuankang-ŝoseo, kaj denove ekflirtas ruĝaj flagoj super la konstruejoj. La bruldetruita ponto en la okcidenta antaŭurbo de Lhasa, jam rekonstruiĝis. La laborantoj de domkonstrua brigado de la Administracio de la Kinghaj-Tibeta Ŝoseo uzis nur 9 tagojn por rekonstrui la 27 metrojn longan ponton super Liuŝa-rivero de Lhasa. La tibetanoj Cevang kaj Tubtannima, kiuj partoprenis la rekonstruadon de la ponto, diris: "Ni ne nur rapide kuracos la vundojn, sed rekonstruos nian hejmlokon pli bela."

Eksterordinare okupataj estas la laborantoj de la Poŝto-telekomunika Oficejo de Lhasa en la lastaj tagoj. Telegramoj por la dekreto de la Ŝtata Konsilo kaj por konsoli la trupojn de la Tibeta Arme-regiono kaj postuli punataki la ribelulojn arope alvenas el diversaj lokoj de Tibeto kaj de la tuta lando. Longa vico da klientoj atendas por ekspedi depeŝojn informi al siaj karuloj pri la likvido de la ribelo, kaj la komercistoj rapidas mendi varojn el aliaj lokoj per telegramo. Aŭtobusoj por Ĉomo, Karmo k.a. lokoj rekomencis sian regulan veturadon kun poŝtajoj. Telefonaj laboristoj rapide rekonstruis la fadenliniojn terure detruitajn de la ribeluloj kaj refunkciigis ankaŭ la liniojn al la ĉirkaŭurbo. Rekonstruiĝis ankaŭ la altensiaj elektrofadenaj linioj en la urbo dank' al la kuna klopodado de Tibetaj kaj hancaciaj laboristoj.

Semado de feliĉo

La printempo en Lhasa nun viglegas kun la diligentaj plugantoj.

La agrikultura eksperimentejo "Julio-unua" de Lhasa komencis kampanjon de sturma monato en produktado. Oni duobligis la planitan produktokvanton de legomo, kaj nun sturmadas tage kaj nokte en plugado, sterkado, irigaciado kaj semado.

Liaŭ Ze-jong kaj Ĉen Haj-he, junaj traktoristoj de la farmo "Aŭgusto-unua" de la Tibeta Arme-regiono, ĝoje kondukantaj siajn kuregantajn traktorojn sur la kamparo, diris: "La printempa plugado de tiu ĉi jaro estas eksterordinara. Grandan venkon ni gajnu en la agrikultura batalo por bonvenigi la unuan semadon post la likvido de la ribelo."

Nur kelkajn tagojn post la likvido de la ribelo, la laborantoj de la Transporta Ĉefstacio de Lhasa de la Administracio de Kinghaj-Tibeta Aŭtovojo, kiuj heroe batalis kontraŭ la ribeluloj, jam komencis arboplantadon, kaj en la 29-a sola ili sukcesis planti 1,500 arbojn. Kaj post tio ili komencis plugadon kaj semadon. Ankaŭ la oficistoj kaj armeanoj partoprenis la kulturadon de printempaj legomoj.

Sur la ŝoseoj al la apudurbaj distriktoj, tien kaj reen kuradas ŝarĝaŭtoj por transporti sterkon. Sur la kampoj ĉirkaŭ Lhasa, Tibetaj kamparanoj komencis plugadi kaj irigiaciadi por semado. Novan aspekton Lhasa ekhavas en la bela printempo.



Detruitaj elektraj fadenoj riparataj

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

Valora antikva enciklopedio represota

En la jaroj 1403-1424 p.K. en Ming-dinastio laŭ imperiestra ordono oni kompilis grandegan klasifikan enciklopedion nomatan "Jongle Dadian". Ĝi fakte entenis ĉiujn librojn verkitajn en antikva tempo ĝis la tempo de kompilado. La tuta enciklopedio ampleksis 22 877 librojn, krom 60 libroj de antaŭparoloj kaj enhavolisto, kaj estis bindita en 11,095 volumojn. Sed tre bedaŭrinde, post la finkompilado oni ne sukcesis fari por ĝi lignan preskliŝaron kaj ĝin presi pro tro granda amplekso, kaj ĝi restis nur en du manskribitaj kopioj. Pro longjara malbona konservado kaj gardado, ĝis la tempo de la imperiestro Kian-long (1736—1795 p.K.) de Kingdinastio, restis jam nur iom pli ol 9,000 volumoj. En 1900 ĝin trafis plej granda katastrofo. La imperialistaj invadaj armeoj, t.n. la aliancaj armeoj de la ok landoj, forrabis la plej grandan parton de la enciklopedio. Restis nur 64 volumoj. En lastaj 10 jaroj dank' al kontribuo de la enlandaj libro-kolektantoj kaj senprofitema redono de la frataj landoj Sovetio kaj Demokrata Respubliko de Germanio, nun en

Pekina Biblioteko, la plej granda biblioteko en Ĉinio, rekolektiĝis jam 714 volumoj de tiu ĉi enciklopedio originalaj aŭ reproduktitaj. Por kontentigi la bezonon de la vastaj studentoj kaj legantoj, Ĝonghua-librejo nun decidis presi la ekzistantajn volumojn.

Du grandaj enlandaj havenoj

Estos konstruataj du grandaj novaj havenoj riveraj en la kuranta jaro en Ĉinio. Unu el ili estas Jangsimiaŭ-haveno, ĉe la urbotrio Vuhan, en Hubej-provinco, pivotpunkto por enlanda komunikado landa kaj surrivera. Ĝia konstruo komenciĝis jam de la 24-a de marto. La tuta areo de la konstruado ampleksas ĉirkaŭ 400,000 kvadratajn metrojn kaj en ĝi stariĝos 10 modernaj kajoj. La ĉefaj laboroj de ŝarĝado kaj malsarĝado estos farataj mekanike kaj elektre. Ĉiujare ĝi kapablos akcepti kaj elsendi pli ol 9,500,000 tunojn da varo. Antaŭ la fino de la kuranta jaro ĝi estos plejparte finkonstruita kaj parte estos transdonata al utiligo.

La alia estas Ĝanghuabang-haveno ĉe la okcidenta bordo de Huangpu-rivero en Ŝanhajo. Post la konstruiĝo ĝi povos ak-

cepti oceanan ŝipon kun tunaro de 10,000-30,000 t. kaj 11-metra enakviĝo. Ĝia unua periodo de konstruado ankaŭ finiĝos en la kuranta jaro.

Tri grandaj han-lingvaj vortaroj

Estas kompilataj tri grandaj vortaroj de han-lingvo. Unu el ili titoliĝas "Vortaro de Moderna Han-lingvo". Ĝi estas kompilata de la Lingvistika Instituto de Scienca Akademio de Ĉinio. En ĝi oni kolektas ĉirkaŭ 50,000 ĝis 60,000 vortojn inkluzive la kunmetitajn.

La alia karakteriziĝas per kolektado de vortoj el la klasikaj verkoj. Ĝi estas kompilata sur la bazo de iu malnova vortaro "Ci Juan" ('Etimologia Vortaro') eldonita de la Komerca Presejo.

La lasta estas enciklopedia vortaro. Ĝin kompilas la redakcio de Ĝonghua-librejo sur la bazo de la sufiĉe vaste konata vortaro "Ci Haj" (Maro de vortoj). Post vasta revizio ĝi enhavos ĉirkaŭ 30,000 komunajn (inkluzive la kunmetitajn) kaj 60,000 fakajn vortojn. Ĉe la fino troviĝos ankaŭ multaj utilaj apendicaj konsultmaterialoj. Kaj la tuta libro ampleksos ĉirkaŭ dek du milionojn da ideografiajtoj.

VANGFUGING—unu el la Pekinaj stratoj

ĈIUJ niaj eksterlandaj geamikoj, kiuj iam vizitis nian ĉefurbon Pekino, ĝenerale scias la straton Vangfuging. Tamen se vi faris la viziton antaŭ kelkaj jaroj, la fizionomio de Vangfuging en via cerbo jam multe malsimilas al la reala hodiaŭa. Permesu al mi konduki vin nun ree pririgardi la nomitan straton.

Estas nokto. Tra la fenestroj de la oficeja domego de la "Popola Ĵurnalo" disversiĝas abunda lumo. Homoj svarmas en Hinhua-librejo, Vangfuging-magazeno, kiuj ĉiutage akceptas milojn kaj dekmilojn da klientoj. En la montrofenestroj de fotografejoj, la fotoj de viglaj ŝtallaboristoj kaj la naŭ heroinoj, kiuj partoprenis la konstruadon de la Dektri-maŭzolea Akvokonservejo, ridas al rigardantoj anstataŭ tiuj de ŝminkitaj novedzinoj kun kapgazoj. Sur la trotuaro iras multe da pasantoj, kaj malaperis la vagvendistoj kiuj krivendis laŭ la strato el pasinta tempo.

Kiam vi iras en iun ajn vendejon, la gevendistoj akceptas vin fervore, sincere kaj afable, tute same, ĉu vi aĉetos ion aŭ ne. Vi povas sidiĝi kaj iom ripozi, ili donas al vi akvon, kaj afable demandas vin pri viaj deziroj kaj bezonaĵoj. Kiam vi hezitas ĉe elekto, ili helpas vin per konsiloj kaj proponoj.

Ĉi tie, oni ĝuas ĉian neatenditan oportunon ĉe la aĉetado. Knabinoj povas ricevi kontraŭ kelkaj cendoj diverskolorajn lanfadenojn kiujn ili ŝatas por ligi la harojn. Oni povas aĉeti eĉ unuopan ŝuon por anstataŭigi la eluzitan laŭ la sama formo kaj grandeco de la alia.

La ĉiovenda vangfuging-magazeno



Iu kripulo kiu akiris unuopan ŝuon por kompletigi la paron, kortuŝite diris al la vendisto de la ŝuvendejo de Dong-an Bazaro: "Mia maldekstra kruro ne povas subporti mian korpon pro malsano, tial ĉiam okazas, ke mia dekstra ŝuo facile difektiĝas dum la maldekstra restas ankoraŭ tre bona. Ofte mi sopiris kaj pensis: Kiam ŝuvendejo vendus al mi unuopan ŝuon? Nun mia revo ja efektiviĝas. Mi vere ne scias, kiel mi esprimu mian senton al vi."

Iuj vendejoj rompis malnovan rutinon kaj aplikas novajn manierojn de vendado, ekzemple: la laborantoj de la pomalgranda vendejo de la Pekina Medikamenta Kompanio, nun eliras de post la vendotablo, puŝante ĉaron plenigitan de medikamentoj vagvendas en stratetoj, kaj estas tre bonvenigataj de la loĝantoj. Antaŭe multaj aĉetantoj, kiuj alvenis Pekinon de aliaj lokoj por aĉeti bezonatajn varojn, trovis malfacilon pro tio ke ili ne konas Pekinajn stratojn. Nun, alveninte Vangfuging, oni povas aĉeti ĉian varon, kia estas aĉetebla en la urbo.

Por helpi aĉetantojn, la vendejoj en Vangfuging eĉ konsentas interŝanĝi samspecan varon, kiun oni aĉetis en alia urbo, kaj reveninte trovas ĝin netaŭga je grandeco, nur se ĝi apartenas al la sama speco de ilia varo. Antaŭnelonge iu aĉetis el Ŝanhajo paron da infanaj ŝuoj, hejmenveninte li trovis malagrabla, ke ili estas tro malgrandaj. Tamen nun li jam interŝanĝe akiris pli grandan paron de la Porinfana Vendejo de Vangfuging, kaj tio ĝojigas la tutan familion.

Aĉetantoj el aliaj lokoj, kiuj havas multe da aferoj por fari sed disponas malmultan tempon en Pekino, jam ne maltrankviliĝos pro tempomanko, ĉar vendejoj de Vangfuging, ĉiu laŭ sia karaktero, pliigis diversajn servojn, tiel ke aĉetanto veninte al nur unu vendejo povas fari multe da aferoj. Oni ne bezonas urĝiĝi por aĉeti vagonaran bileton, oni povas veni senĝene al Vangfuging por iom pririgardi, manĝi en restoracio aŭ raziĝi en barbirejo, ĉar tie ĝuste ekzistas servo, kiu zorgas por la klientoj havigi vagonaran bileton. Tia banejo ankaŭ mendas kinejan bileton por banantoj. La Ĉina Fotografejo translokiĝinta el Ŝanhajo lastatempe starigis ĉe si barbيران servon, kaj en la tualetejo

oni trovas kombilojn, razilojn k. a. tualetajn objektojn.

En multaj aliaj servaj butikoj ankaŭ efektiviĝis samtempa perado de teatraj, vagonaraj, kinejaj biletoj, vendo de certaj manĝaĵoj, objektoj, libroj, jurnaloj, gazetoj kaj servado por venigi taksion, agentado de ŝparkaso kaj longdistanca telefono k. c. En tio la klientoj trovas grandegan oportunon.

Laŭ bezonoj de konsumantoj, en kelkaj vendejoj oni deĵoras dum la tuta nokto. Se vi havas neatenditan bezonon aŭ forveturas pro urĝa afero en nokto, kaj havas monon deponitan en la Vangfuging-a Ŝparbanko, vi ne embarasiĝos kaj povas elpreni la monon de tie je kiu ajn horo. Tiuj kiuj laboras en nokto, povas profundnokte iri en bar-birejon, tetrinkejon, manĝi en restoracio, aĉeti fruktojn aŭ kukon en fruktovendejo kaj aĉeti diversajn necesajojn ĉe giĉeto de ĉiovendejo.



En Vangfuging-magazeno

La agmaniero faru ĉion por la klientoj, de la komercaj laborantoj de la strato Vangfuging, gajnis laŭdon de multaj klientoj enlandaj kaj eksterlandaj, ĉiu-tage venas al ili amaso da laŭdskribaĵoj. Sed ili ne kontentiĝas kaj diras: “Ni daŭre klopedos, por ke ĉiu alveninta kliento kontentiĝu, tute egale, ĉu li aĉetas ion aŭ ne.”

Ĉu Vej-haŭ:

“Juna Pioniro” Kvardek-jara

KIAM mi estis malsupre ĉe la montpiedo, mi jam aŭdis, ke en la arbohaka brigado de forsta mastrumo de Janghi laboris iu “juna pioniro” kvardekjara. Post mia alveno al tiu brigado, mi tuj scivoleme demandis pri tio la brigadestron Ĝan Gin-fa. Li ridis kaj antaŭ ol li ekparolis, eniris viro plenkreska, kun dikaj brovoj, sveltaj okuloj kaj kvadrata vizaĝo. Ĵus kiam li deprenis la lianan kaskon, Ĝan lin demandis kun rideto: “Kiom vi hakfalis hodiaŭ?” Viŝante la ŝviton, la viro respondis kun embaraso pro ĉeesto de fremdulo: “Ne multe, nur dudek kvar.” Post lia foriro Ĝan diris al mi, ke tiu homo nomata Vu Hoŭ-ĉang, estas ĝuste tiu “juna pioniro” kvardekjara.


Laŭ la esprimo de Ĝan: “Li energie laboras kiel juna viro kaj nesatigeble lernas kiel juna pioniro.” Ekzemple, en arbohakado en la profunda montaro, la arboj kreskas tre altaj kaj dikaj, ke iuj el ili estas ĉirkaŭbrakumeblaj nur de kelkaj homoj kune. Ne estas simpla afero, ke li povas hakfali dudek kvar en unu tago. Li eŝtas inter la tri unuaj el du-tri-dek junuloj.

“Sed pro kio oni nomas lin ‘juna pioniro’?” mi demandis scivoleme. “Ne malpacientiĝu,” diris Ĝan. “Mi ankoraŭ ne finis la rakonton.”

En la brigado ekleviĝis alta tajdo de lernado. Iun tagon, ĉiuj iris al la teknikisto de arbarkulturo

Liu Gju-ĉeng por aboni gazetojn kaj jurnalojn. Vu Hoŭ-ĉang volis ion aboni, sed al li estas nekomprenebla la Forsta Heroldo kaj tro malfacila ankaŭ estas la Teknika Revuo de Arbokulturado. Ĉu do ne aboni kaj lerni? Ju pli li pensis, des pli li konvinkiĝis, ke li devas aboni iun gazeton. Sed li ellernis nur ĉirkaŭ du cent ideografiaĵojn. Kian gazeton aboni? Petante konsilon de kamarado Ĝan li demandis: “Nu, brigadestro Ĝan, mi ne povas legi la provincan jurnalon Gianghi-jibaŭ, des malpli la ĉefurban Ĵenmin-jibaŭ, eĉ stumblas pene ĉe loka ĵurnalo Ginggangŝan-baŭ. Kion fari? Post nelonga cerbumado Ĝan respondis: “Plej facile legebla eble estas la ‘Juna Pioniro’, kiun oni eldonas por lernantoj de la 3-a kaj la 4-a klasoj de elementaj lernejoj kun multaj bildoj kaj ilustraĵoj.” Aŭdinte, ke ĝi enhavas eĉ bildojn, Vu Hoŭ-ĉang tuj leviĝis kaj galopis al Liu Gju-ĉeng, kaj ĝoje diris: “Mi volas aboni la ‘Junan Pioniron’!” Aŭdinte pri tio ĉi Liu ekridegis, sed tuj haltis de palpebrumo de brigadestro Ĝan. Kaj tiel disfamiĝis en la brigado, ke kvardekjarulo abonis ‘Junan Pioniron’.

Foje dum ripoztempo, mi volis interparoli kun Vu, kaj post serĉado mi trovis, ke li sin kaŝis en arbitaro legante la gazeton, kiun li abonis. Al li ŝajnas, ke lia abonado de ‘Juna Pioniro’ estas duonsekreta. Ja fakte, pri tio ĉi ĉiuj jam sciigis, kaj la moknomo ankoraŭ disfamiĝis eĉ al montpiedo.



La 75-metrojn alta Huangguoŝu-akvofalo en Gujĝoŭ-provinco *Foto: Aŭ Si-hong*

GUJĜOŬ-PROVINCO, situanta en la mezo de l' Sudokcidenta Ĉinio, estis longe konata kiel sterila regiono antaŭ la liberiĝo. Kun ĝia nomo estis ligitaj jenaj vortoj: "Ne serenas sinsekve tri tagojn la ĉielo, nek ebenas en tri lioj la tero kaj restas en ĉies monujo ne pli ol tri moneroj". Ofte mankis al deksep-ok-jaraj knabinoj propra pantalono.

Antaŭ du jaroj, mi finis mian lernadon en Ŝanhajo kaj kune kun kelkaj el miaj samlernejaj gradigitoj venis al Gujĝoŭ kiel konstruantoj, kun firma preteco por nin hardi en tiu mizera regiono. Sed hodiaŭ mi volas, kiel Gujĝoŭ-ano, laŭdi la belan kaj fekundan provincon kaj konigi al la legantoj iom pri ĝiaj nunaj aspektoj.

Ŝajne abundas precipe la printempaj tagoj

Gujĝang, la ĉefurbo de la provinco, estas tre bela. Ties pompa Jan-an-strato estas eĉ pli rekta

Vang Baŭ-min:

GUJĜOŬ

kaj ebena ol la samnoma strato en Ŝanhajo, la plej granda urbo en Ĉinio. Laŭ la tuta strato kontinue spaliras domegoj plej-parte nove konstruitaj dum la lastaj du jaroj. En la mezo de multaj stratoj estas florbedo kun rekte starantaj palmoj kaj plene florantaj oleandroj kaj kokoineoj.* La nove asfaltita Ĉaŭĵang-strato kondukanta de la stacidomo ĝis la komerca centro larĝas je 50 metroj kaj ĉe ĝiaj ambaŭ flankoj estos baldaŭ konstruataj unuj post aliaj imponaj konstruaĵoj de Radio-disaŭdigo, televido, poŝto kaj telekomuniko, publika servado k. c. Laŭplane baldaŭ kuros sur tiu ĉi strato elektraj omnibusoj. Lastatempe mi akceptis aron da nove alvenintaj gradigitoj de Ŝanhajaj lernejoj. Vidinte la kvinetaĝan magazenon, ili ekridis unu al la alia, ĉar ili kunportis de Ŝanhajo tro multajn objektojn, kiuj sufiĉe ŝarĝis ilin per prizorgado sur la vojo. Mi rimarkis, ke ili plej maltrankvilas pri la loka klimato. Sekve mi diris al ili: La printempo kaj aŭtuno estas precipe longaj ĉi tie. La floroj estas ĉiam tiel pompe florantaj kaj la arboj tiel grase verdaj, ke ŝajne abundas precipe la printempaj tagoj.

Sed en dimanĉoj, oni tamen preferas ekskursi per omnibusoj al Huaki, ĝenerale rigardata kiel la "floro de la monturbo", je dekelkaj kilometroj for de la urbo, kie sin trovas travideble klara akvo en la riveretoj kaj pli belaj montoj. Tiel en somero kiel en vintro la akvo en la riveretoj ĉiam fluas murmurante kaj la montoj restas verdaj. Al la Okcidenta Lago de Hangĝoŭ kaj Taj-lago de Vuhi, du famaj pitoreskaj distriktoj de Ĉinio, Huaki estas tute komparebla.

Rava aspekto de konstruado

Multaj jus alvenintaj personoj ne nur ĝuas la naturan belecon de Gujĝang, sed ankaŭ estas tre baldaŭ ravitaj de la aspekto de ĉitiea konstruado. Estas neeble prezenti ĉiujn fabrikojn kaj uzinojn, ĉar tro multaj. Ekzemple, la moderna uzino de aluminio, la fabriko de fajrorezistaj materialoj, kiu estas la plej granda en Ĉinio, kaj la Fabriko de Kemia Sterko de Gujĝang, kies jara produkta kv-

* *Musa cocoinea*

PROVINCO

anto estas duoble tiel granda kiel tiu de la tuta lando antaŭ la liberiĝo, estas ĉiuj tre grandiozaj entreprenoj. Malgraŭ la fakto, ke Gujĝoŭ estas riĉa je mineraloj, oni neniam produktis ŝtalon tie en la pasinteco. Sed ekde la fino de la lasta septembro, la Ferŝtala Uzino de Gujjang, kun jara produkto de 40,000 tunoj da ŝtalo, jam komencis produktadi. Antaŭ la liberiĝo sin trovis en Gujjang nur dekkelkaj malgrandaj kadukaj fabrikoj, kaj produktiĝis nenia kompleta maŝineto. Sed en la lasta jaro sole la grandaj industriaj entreprenoj nove konstruitaj kaj pligrandigitaj en la tuta urbo nombris pli ol 70.

“Cielskrapuloj starigis dum palpebrumo”

Jen estis la titolo prave aldonita al iu raporto en la *Gujjang-a Ĵurnalo*, per kiu la raportisto priskribis la rapidecon de la fundamenta konstruado en Gujjang. Komence de 1957, la loĝantaro de la urbo nombris nur pli ol 300,000, sed nun la nombro atingis ronde 800 000. Kompreneble la cifero ne povas esti ekzakta, ĉar ĉiutage ankoraŭ svarme alvenas ĉi tien miloj da novaj konstruantoj.

Jam finiĝis la termezura laboro de la Hunan-Gujĝoŭ-a Fervojo kondukanta orienten al Hunan-provinco, la Siĉuan-Gujĝoŭ-a Fervojo kuranta norden al Siĉuan-provinco estas en sturma konstruado, la konstrua laboro de la Junnan-Gujĝoŭ-a Fervojo sin kondukanta al Junnan-provinco en la okcidento jam komenciĝis, kaj la Gujĝoŭ-Guanghi-a Fervojo, kiu direktiĝas suden al Guanghi-a Aŭtonoma Regiono de Ĝuang-nacio, estas jam malfermita al trafiko. Krome, la fervojo de Siĉuan al Junnan ankaŭ trapasas parton de Gujĝoŭ. Kaj la tri provincaj fervojoj por servi al la ferŝtala, alumina kaj maŝinfabrika industrioj jam estas en konstruado.

Industrio disvolviĝas en ĉiuj gubernioj tra la provinco. Vojaĝante aŭtomobile en Gujĝoŭ, oni povas vidi de tempo al tempo, ke ŝarĝaŭtoj plenigitaj per konstruaj materialoj kuras tien kaj ĉi tien sur la ŝoseo kvazaŭ navedoj. Mineksplodoj por rompi la montojn eĥis sinsekve en la valoj. Sur multaj ebenajoj ĉirkaŭataj de montoj ofte ekaperas subite fluo da konstruantoj, kiuj estas aŭ ebeni-

gantaj la teron, aŭ masonantaj aŭ enverŝantaj cementfluidaĵoj, nome, ili estas konstruantoj fabrikojn. La ĉielen skrapantaj domegoj de la fabrikoj formas akran kontraston kun la kadukaj kabanoj, kiujn oni ankoraŭ ne trovis tempon por malkonstrui. Kelkaj ferŝtalaj uzinoj, kun jara produkto de 40,000 tunoj da ŝtalo, kaj aliaj kolosaj fabrikoj estas aŭ finkonstruitaj, aŭ ĝuste konstruitaj proksime al la lokoj, kie troviĝas la koncernaj krudaj materialoj. Multaj urboj jam havas siajn proprajn elektrejon kaj fabrikojn de maŝinoj, kemia sterko, aluminio, kupro, ktp. Jen sur la montsupro kaj ĉe la montpiedo en Gujĝoŭ oni povas aŭdi kantojn de la konstruantoj.

Konstruantoj bonvenigataj


La rapidega disvolviĝo de industrio alportas ĝojindan streĉecon precipe la nesufiĉecon de laborforto. En kelkaj fabrikoj, tiuj kiuj venis nur du-tri monatojn pli frue estas jam rigardataj kiel malnovaj laboristoj kaj tiuj kiuj laboris pli longe ol unu jaron estas jam majstroj. La nacimalplimultaj kamparanoj mjaŭ-aj, buji-aj, dung-aj, k. a. amase eniras en fabrikojn. Gradigitaj el popollernejoj kaj mezlernejoj ankaŭ grandnombre iras partopreni en konstrua laboro. Sed eĉ tiel la nesufiĉo de laborforto estas ankoraŭ multe sentata ĉie. Kiel urĝe estas bezonataj konstruantoj en Gujĝoŭ!

Gujĝoŭ estas riĉa je montoj, verdverdaj montoj. Sed oni ŝatas ilin ne nur pro ilia beleco aŭ majesteco, sed pro tio ke ili estas montoj kun trezoroj, sur kiuj kreskas kelkdeko da specialaj regionaj produktaĵoj kaj sub kiuj estas kaŝataj riĉegaj mineraloj. Ne estas troigo, kiam oni priskribas Gujĝoŭ per la frazo “Plenkovras la montojn arĝento kaj oro, subtere sin kaŝas minerala trezoro.”

Kiu povas ankoraŭ aserti, ke Gujĝoŭ estas neevoluinta kaj mizera provinco?

Jen-an-strato en Gujjang

Foto: Vang Gi-nan



La delikataj metiartaĵoj el lako

ANTAŬ pli ol 4000 jaroj, oni jam povis fari lakajojn en Ĉinio. Tiam troviĝis la ruĝa kaj nigra lakoj. Oni povas konstati laŭ la elfositaj lakajoj de l' Epoko de la Militantaj Regnoj (403—221 a.K.) apud la urbo Ĉangŝa de Hunan-provinco, ke en tiu epoko la lakajo jam tiel populariĝis, ke ne nur la kaleŝoj de la aristokratoj, sed ankaŭ taburetoj, tabloj, taso, teleroj, juvel-skatoloj, la teniloj de lancoj kaj ŝildoj ktp. estis pentritaj per lako. Kiel internajon de lakajo oni uzadis ne nur lignon kaj tolon sed ankaŭ ledon. Precipe rimarkinde estas, ke tiam la lakajoj jam estis ornamitaj per koloraj desegnaĵoj pentritaj per ruĝa, nigra, blanka, verda, flava kaj oranĝa lakoj.

Dank' al la daŭra disvolvado de la metiartistoj en ĉiuj epokoj, multaj estas la specoj de la modernaj lakajoj de Ĉinio. La ĉefaj el ili estas: La ŝellakajo de Fuĝoŭ, la skulptita kaj inkrustita lakajo de Pekino kaj Jangĝoŭ, la mult-kolora gravurita lakajo de Ĉengdu, la skulptita kaj inkrustita lakajo de Ŝanhajo, la lakajo inkrustita per brodaĵo de la urbo Tiangin, la lakajo kun leda internajo de la urbo Dading, Gujĝoŭ-provinco, la inkrustita lakajo de la urbo Hi-an, la inkrustita lakajo de la urbo Tiansuj, Gansu-provinco, la

lakajo inkrustita per ora aŭ arĝenta fadenoj de la urbo Vejfang, Ŝandong-provinco, la polurita lakajo de la urbo Pingjaŭ, Ŝanhi-provinco, la lakajo kun la nubformaj gravuraĵoj de la urbo Hingiang, Ŝanhi-provinco ktp. Post la liberiĝo de Ĉinio, la produktado de ĉiuj ĉi tiuj specoj de lakaj metiartaĵoj estas forte revivigitaj kaj disvolvigitaj. Vere belegaj kaj multspecaj estas la produktaĵoj. Mi prezentu al vi kelkajn el la ĉefaj specoj jene:

LA ŜELLAKAĴO DE FUĜOŬ

La ŝellakajo de Fuĝoŭ unue kreiĝis en la tempo de la imperiestro Kian-long de King-dinastio (1736—1795 p.K.). Tiam unu lakisto, nomata Ŝen Ŝaŭ-an, inspirite de la metodo en farado de argilaj idoloj kun toŝelo, unua sukcesis krei ŝellakajon helpe de modlita modelo. Jen la metodo: unue elmodli modelon, ekz-e, de florbazo, homfiguro ktp. el argilo; poste alglui, sur la modelo, plurajn tavolojn da silkteksaĵoj per kruda lako; kaj fine, post sekiĝo, elpreni la argilon el la interno kaj laki la internan surfacon. La ĉefa kaj plej bona metodo de la lakado estas polura lakado. La produktaĵo farita per tiu metodo estas brila kiel spegulo. La metodo estas: unue glatigi la surfacon

de la lakajo ĝis kiam ne troviĝas sur ĝi eĉ grajno da elstarajo kaj malaperis la postsignoj de lakado; due poluradi la lakajon per la miksaĵo de tegolpulvoro, aleŭrita* oleo kaj homaj haroj mantenata ĝis ĝia briliĝo. Post tio, oni plu ĝin lakornamas per multkolora pentraĵo, surprisita desegno, per specialaj koloraj lakoj donante al ĝi aspekton de antikva bronzaĵo aŭ bunta glazuraĵo aŭ ĝin ornamas per inkrustitaj bildoj de pejzaĝo, homoj, floroj, birdoj, bestoj kaj desegnoj el arĝentaj fadenoj, kaj tiel elfariĝas la malpeza kaj bela lakajo.

En Fuĝoŭ ankoraŭ troviĝas alia lakajo kun ligna substofa. La ŝtofo estas tre maldika, tial ankaŭ tia lakajo estas tre delikate malpeza.

Post la liberiĝo de Ĉinio la produktado de tiuj ĉi metiartaĵoj estas



Novaj metiartistinoj de la I-a ŝellakaja Kooperativo de Fuĝoŭ pristudas pentradon *Foto: Je Da-kaj*

protektata, disvolvata kaj plibonigata produkte, arte kaj teknike. En la jaro 1957, la valoro de la produktado en la tuta jaro jam multe superis la plej altan jaran produktovaloron en la pasinteco. Krom daŭra plialtigo de la arteco kaj plimultigo de la specoj, nun oni ankaŭ klopodas modernigi kaj mekanikizi la produktadon.

LA SKULPTITA LAKAĴO DE PEKINO

La skulptita lakaĵo jam tre disvastiĝis en Tang- kaj Song-dinastioj (618—1279 p.K.). La produktado de Pekinaj skulptitaj lakaĵoj komenciĝis en Ming-dinastio (1368—1644 p.K.). Dum la regado de la imperiestro Kian-long de King-dinastio, jam pli maturiĝis la arto en lak-skulptado kun temoj ĉefe de homfiguroj kaj belaj konstrua-

joj. Kaj el ĝia daŭra disvolviĝo rezultiĝis, ke en la jaro 1914, la ekranego kun la bildo pri la Gefea Celebrado de la Diina Naskiĝtago, skulptita de s-ro Vu Jing-hjuan k.a., gajnis la unuagradan premion en la Universala Ekspozicio en Panamo.

La produkta procedo de skulptita lakaĵo estas: unue laki la subŝtofon, fojon post fojo, ĝis la postulata dikeco (ĝenerale ok aŭ naŭ fojojn, sed plej dike ĝis pli ol cent fojoj). Post sekiĝo de la lako, oni desegnas sur la lakaĵoj diversspecajn pejzaĝojn, florojn, belajn konstruaĵojn aŭ bildojn pri popolaj rakontoj, kaj komencas la skulptadon per akraj tranĉiloj. La akraj kaj klaraj tranĉoj kaj la krianta, freŝa ruĝkoloro de la lako karakterizas la artaĵojn. Kaj skulptitaj figuroj, floroj, birdoj kaj aliaj, kun belaj tradiciaj fon-desegnoj, formas harmoniajn kaj brilajn artopecojn.

Kong King-jan:

Mi kaj Malgranda* Huang

VICGRUPESTRO Huang Jue-gju estis novico, kiu alvenis al nia termezura taĉmento nur en 1956. Li estis ĉirkaŭ dudek-jaraĝa, ne altkreska, kun nazo iom suprenturnita, vizaĝo brile nigre bruna kaj aspekto tre sana kaj fortika. Ĉar mi estis la grupestro, nature ni du devis bone kunagi. Sed, je la komenco, ja regis inter ni tiel granda malakordeco, ke ni tuj disputis, ĉiufoje, post interŝanĝo de nur malmultaj vortoj. Tamen, kun la paso de tempo, ni iom post iom, mi ne sciis kiel, fariĝis nekompareble interakordaj.

Tiel estis la afero . . .

I

Escepte min mem, ĉiuj anoj en nia grupo estis junuloj, kiuj finis nur la kursaron de elementa lernejo, kun malalta kulturnivelo kaj nenia labor-sperto. La taĉmentestro jam promesis de longe fortigi nian grupon per vicgrupestro, sed dum longa tempo, ni atendis vane.

Iun tagon, la taĉmentestro venis al nia grupo kaj ĝoje informis nin ke la vicestro fine venos.

“Kiu li estas?” ĝoje demandis mi tuj.

* Malgranda estas epiteto donata al nomo de junul(in)o por montri intimecon, dume maljuna al tiu de pli malpli aĝa viro.

“Malgranda Huang de la oka grupo. Kiel plaĉas al vi?” diris la taĉmentestro palpebrumante.

Ho! Mi estis glacidusita de la verto ĝis la kalkanoj. Do estas li, kiun mi ja bone konas. Ĉu tiu nigruleto fariĝos nia vicestro? Lastjare li ankoraŭ laboris kiel kuiristo kaj promociita kiel termezuranto nur ĉi-jare. Kvankam membro de la Ligo de Komunismaj Junuloj, li vizitis lernejon rur tri jarojn, kaj eĉ ne povas skribi leteron sen gramatikaj eraroj. El tiel multaj homoj en la taĉmento, ĝuste li estas elektita. Mi vere ne povis min konvinki tiam, kvankam mi povis diri nenion.

“Nur atendu mallongan tempon! Li ĝuste nun partoprenas iun konferencon kaj venos post kelkaj tagoj. Li estas juna kaj sensperta. Multe lin helpu!” La taĉmentestro tuj foriris post tiuj vortoj.

II

En iu pluva tago, ĉie estis koto, tamen ni eliris labori. Ni mezuris nivelon por 8 kilometroj, kaj starigis 800 staciojn. Tio estis tute nova rekordo. Mi estis treege ĝoja. Kiam mi revenis de la laboro, mi asignis la kalkuladon al du grupanoj kaj decidis mem verki artikolon pri nia atingo, por refuti tiujn kiuj diraĉis, ke mi estas konservativa.

En la vespero kiam mi estis poluranta, vorton post vorto mian verkajon, la pordo subite malfer-

miĝis, kaj fluego da malvarma vento kun dikaj pluvaj gutoj entrudas sin en nian ĉambron. Rapide metinte la manuskripton en mian poŝon, mi iris por fermi la pordon. Tiam enkuris tute malseka nigra

figuro. Se mi ne rapidus flanken, certe li kolizius kontraŭ mi.

“Kamarado! Vi eniris malĝustan ĉambron. La vilaĝanoj loĝas apude. Ni estas de la termezura taĉmento.” Mi pensis, ke estas denove distrikta oficisto, kiu venis alvoki la vilaĝanojn al akvokon-serva laboro. Sed la entrudinto tute ignoris mian klarigon kaj malrapide eltiris papereton el sia poŝo kaj ĝin transdonis al mi. Sen iu ajn klarigo, li ekkriis: “Jen rigardu, maljuna Hu, dirite, farite; vorto donita nepre plenumota.” Tion dirinte li ekpuŝis la kapuĉon de pluvmantelo malantaŭen. Kaj jen ni ekrimarkis, ke li estas la nova vicgru-pestro Huang Jue-gju. En la ĉambro ekvigliĝis neelĉerpebla babilado.

Dum ili babiladis, mi ĵetis rigardon al la papereto donita al mi de malgranda Huang. Kaj la eklego vere min kolerigis. Vidu, antaŭ ol li alvenis al nia grupo, li jam senpripense faris promeson kaj garantion en la nomo de nia grupo al la taĉmento. Nur pensu, kion li promesis kaj garantiis: la finpretigo de aermezura mapo je 1:50,000 en daŭro de nur 20 tagoj. Ĉu ne estas absoluta aŭdacaco! Ja mapo por 450 kvadrataj kilometroj. Sole iradon oni devas fari je pli ol 500 kilometroj por kelkfoja ir-reiro, ne parolante eĉ pri la mezurado. Lastjare, du grupoj kune finpretigis unu mapon dum tri monatoj. En la granda antaŭensaltego ĉijare, ni klopodis ĝin fari en 45 tagoj, sed fakte ni ĝin finis nur post 80 tagoj. Ĉu ne estas fanfarono: en 20 tagoj?

“Maljuna Hu, ĉu tio estas ebla laŭ via opinio?” diris Huang, trovante ke mi jam tralegis lian garantion, rapide tiris la benkon antaŭen al mi kaj samtempe pligrandigis la flamon de la olelampo.

“Demandu la aliajn, ĉu ili havas fidon!” mi respondis malvarme, transdonante por tralegi la papereton al aliaj grupanoj.

Post momento alia mezuranto malgranda Ĝeng ekdiris kvazaŭ kun fido: “Eble efektivebla!”

“Per kio?” mi ne atendis, ke li povus diri tian senpripensajon.

“Per laborfervoro,” intermetis malgranda Liu, alia grupano.

“Fervoro? Kiom da ĝi vi havas? Hodiaŭ en pluvo, ni mezuris nivelon de 200 stacioj, rompante la tagrekordon de la tuta taĉmento. Ĉu ni ankoraŭ ne laboris fervore?”

“Jes, ni laboris kun fervoro, sed ne plene,” Liu argumentis. “Ĉu vi ne aŭdis kion malgranda Huang diris ke alia grupo jam atingis 300 staciojn. La preciza niveltaĉmento jam atingis 360 staciojn. Nia rekordo de 200 stacioj estas jam postrestinta.”

Tiu informo min plene konfuzis.



La Fruktoj Ne Frapu al Viaj Kapetoj

— Popolkanto el Anhuĵ-provinco —

*Hieraŭ la montoj ankoraŭ kalvecaj;
Hodiaŭ sur ili fruktarboj multspecaj.
La arboj, post kelkaj printempo-aŭtunoj,
Jam altaĵ, verdbranĉaj kun fruktoj rondecaj.
Se tiam vi ludos sub ili, amiketoj,
La fruktoj ne frapu al viaj kapetoj.*

Lerni Plugadon

— Infan-kanto —

*Trijara frateto eklernas plugadon,
Li jungis hundeton en sian laboron.
Plugante bojadis la hundo jungata,
Frateto eksentis koleran humoron.
Li lasis la hundon, ekrajdis benketon,
Komencis li lerni direkti traktoron.*

Elĉinigiĝis Laŭlum

“Bone! Se ĉiuj havas fidon, ni provu!” Dio scias, ke eĉ tia homo kia mi fariĝis konservativulo! “Ĉu la taĉmento do sendos pliajn personojn al ni?” Subite venis al mi tiu ĉi demando.

“Pliajn personojn?” malgranda Huang ekridetis. “O, mi forgesis vin sciigi. Por fari antaŭensalton ĉiu-flankan, la taĉmento decidis pliigi la nombron de grupoj. La personaro estos eltirita el ĉiuj grupoj. El nia grupo Vang Jung-hua devas reiri al la taĉmento morgaŭ, por atendi novan postenon.”

“Kiu konsentis?” mi rapide demandis.

“Mi, responde al la alvoko de la taĉmento,” diris malgranda Huang, ekbruligante cigaredon, kvazaŭ nenio eksterordinara estus okazinta.

“Hm!” ekflamis mi. “Kiel vi rajtis fari tian decidon?” Malgranda Huang diris nenion, versaĵne konsciante ke lia ago estis iom senpripensa.

III

Estas strange, ke post la alveno de malgranda Huang, ĉiuj laboris pli energie. Nian taskon de nivel-mezurado ni plenumis tri tagojn pli frue ol planite. Nature mi ankaŭ tre ĝojis pro tio en la koro.

Tuj ni komencis la duan aermezuran mapon. Sed, post kvar aŭ kvin tagoj ni ekkalkulis. Ni ne finis eĉ kvinonon de la tuta tasko. Ŝajne ni ne povos kompletigi nian laboron eĉ en 40 tagoj. Nun malgranda Huang fariĝis ankaŭ silentema. Dum manĝado li ĉiam penseme rigardis al la tegolsulkoj sur la tegmento.

Mi diris al li: “En la pasintaj tagoj, ĉiuj ja montris sian plej grandan fervoron, sed ne multe plialtiĝis la laborefiko. Kompreneble, ĝi jam altiĝis du- aŭ tri-oble kompare kun tiu de la lasta jaro, sed ankoraŭ kuŝas longa distanco ĝis la celo de vi proponita: en 20 tagoj.”

Malgranda Huang subite kaptis mian manon kaj diris: “Maljuna Hu, vi estas la plej sperta veterano en nia taĉmento. Mi tre ĝojis esti translokita ĉe vin. Mi pensis, ke kun tia spertulo kiel vi, ni certe kreos miraklon en la granda antaŭen-saltego. Kiam aliaj grupoj promesis pretigi unu mapon en 30 aŭ 25 tagoj, mi ekpensis, kial ni ne povas tion fari en 20 tagoj per pli granda peno. Kompreneble, mi estis iomete subjektivema, ke mi ne konsiliĝis kun vi antaŭe, sed nun. . .”

“Ne parolu plu pri tio.” Mi pensis, ke, ĉar ni jam faris promeson, ĉiel ajn ni devas plenumi ĝin. “Nun, kion ni devas fari laŭ via opinio?”

“Laŭ mi,” diris li, “ĉar la partio sugestis teknikan renovigon, ĉu ni ne povas trovi la

Ĉiuj Ĉinoj Ŝtaliĝas

Gə Bi-ĝou

*Sur kiu montsupro ne viglas fajrlangoj?
En kiu vilaĝo ne brilas fajrflamo?
Ja kie ne ruĝas la ĉielo-vango?
Kaj kie ne muĝas la fajr-uragano?*

*Jen Jangzi-rivero ondade arĝentas,
kaj l' Flava Rivero oronde torentas;
mil miloj batalas por fero kaj ŝtalo,
de l' Mar' Orienta ĝis Kunlun-montaro.*

*Forĝiĝas el ŝtal' nia paro da glavoj
brilantaj per dek mil blindigaj radioj.
Per unu el ili, nomata pac-glavo,
ekhakon ni faras —
jam altaj montegoj kaj grandaj riveroj
tributas al ni tuj per greno-liveroj.
Kaj per la alia, diablo-subiga,
ekhakon ni faras —
jam Tajvan kaj Penghu en suno baniĝas.
En Nova Ĉinio — la granda fornego, —
ses-cent milionoj da ĉinoj ŝtaliĝas.*

Trad. Laŭlum

elirejon en tiu ĉi direkto. Ekzemple, ĉu estas ia forto latentata en nia labororganizado, marŝolinio, kaj laborprocedaro?”

“Latenta forto? Ĉu ni ne laboris plenforte ĉiutage!”

“Tion mi ja scias,” diris malgranda Huang kun refreŝigita spirito. “Ne helpas sole pliigi la laborintensecon. Mi parolis ja pri teknika renovigo.”

“Kien vi direktiĝas? Ni ne laboras super mekanikajo, sed termezuras. Ne estas mallonga vojo irebla. Restas por ni nur iri pacience per du kruroj.”

Malgranda Huang diris nenion kaj fiksis sian rigardon al la dubeblanca vojeto sur la monto kontraŭ ni.

“Maljuna Hu,” subite li turnis sian kapon al mi. “Laŭ nia nuna labormetodo, por punktelektado kaj signostarigo, observado, kaj fine, alĝustigo kaj desegnado, ni devas trairi tri- aŭ kvar-foje la saman vojon. Ĉu ni ne povas ĝin trairi nur unu-foje?”

“Ho!” ekaŭdinte mi estis surprizita de la ideo. Post iom da meditado mi ekĝojis, ĉar se la laboroj de la kvin laborantoj, estos reorganizitaj, oni ja povos fini la tutan laboron en sola rondiro.

“Jes, tio estas ebla,” mi diris kaj ekklarigis mian intencon al malgranda Huang. Li eksaltis pro ĝojego kaptante min je la brako.

IV

Estis la lasta tago por fini nian laboron.

Liu kaj Ĝeng jam foriris por partopreni en la laboro de alĝustigo kaj desegnado. Huang kaj mi kune iris por observado. Ni alvenis al la piedo de Junmeng-monto. La monto estas tre kruta, ke ni ne povis vidi ĝian pinton. Ĝi estis tute kovrita de densa arbetaro. Ni faris kelkajn ĉirkaŭirojn ĉe la montpiedo, sed ne povis trovi ian vojeton por supreniri.

“Ĉesu!” ekkriis Huang. “Kiam ni povos atingi la montsupron tiel senfine ĉirkaŭirante

ĉi tie? Venu! Mi estu la pioniro!” Kaj li rapid-paŝe enpenetris en la arbaron supreniginte la instrumentujon sur la ŝultro.

En la densejo oni sin trovis kvazaŭ en vasta maro, ĉirkaŭita ĉie de diversaj arbetoj kun trunkoj dikaj kiel vinglasoj. Ju pli supren ni iris, des pli densa fariĝis la arbetaro, kaj poste ni efektive ne povis enpuŝiĝi. Tamen, finfine ni sukcesis suprengrimpi tenante nin sur la lianoj rampantaj sur la roko.

Fininte la observadon ni kalkulis kaj trovis, ke ni plenumis la taskon en tempo du tagojn malpli ol antaŭdifinitaj 20 tagoj.

Huang ĝojegis dirante: “Jen, maljuna Hu! Decidiga estas la homo! Ĉio, kion oni povas elpensi kaj ebla laŭ la objektivaj kondiĉoj, certe povas efektiviĝi.”

Tion aŭdinte mi ekmemoris mian tiaman sintenon al Huang, kaj tuj ruĝiĝis ĝis la oreloj.

RAKONTO PRI RIZO

—Popola legendo de Taj-nacio*—

Redaktita de Jan Feng

ANTAŬ longa longa tempo, la rizgrajnoj de nia regiono ne estis tiel etaj kiel nuntempe. Tiam la grajno de glueca rizo estis same granda kiel anasovo, kaj tiu de ordinara rizo kiel kokovo. Ili estis dikaj kaj solidaj, bonodoraj kaj bongustaj, kaj kun flugiloj, per kiuj ili al familioj laboremaj alflugis. Tiam en nia regiono neniu malsatis kaj troviĝis neniu mallaborema. Ĉiuj vivis en granda harmonio. Feliĉaj estis la tagoj.

Sed kial poste fariĝis malgrandaj la rizgrajnoj? Kial ili ne plu flugas? Estis longa historio pri tio.

Iun jaron, la patriarko de nia regiono prenis al si edzinon el alia regiono. Ŝi nomiĝis Mihaguj, kaj estis tre tre mallaborema virino. Ĉiufoje ŝi dormis tri tutajn tagonoktojn ĝis ŝi revekiĝis. Ankaŭ tre aĉan malvirton ŝi havis, nome: ŝi envias ĉion, kion havas aliuloj.

En la komenco de ŝia alveno al nia regiono, ŝi ne tiom malbone kondukis kaj laboris kune kun ĉiuj aliaj. Sed poste ŝi iom post iom ŝanĝiĝis. Kiam ŝi vidis kiel la grajnoj svarme flugas al la

hejmoj de laboremuloj post ilia maturiĝo, kaj nur tre malmultaj el ili flugas al la ŝia, ŝi ekpensis:

“Kiel bone estus se ĉio apartenus sole al mi! Tiam, mi povus kuŝi senfare kelkdek jarojn, sen zorgo pri manko de manĝaĵoj. Per la superflua parto mi povus intersanĝe akiri vestaĵojn de la aliaj!”

Okupita per tiu ideo, la mallaborema Mihaguj ĉiam cerbumis, kiel tion efektiviĝi kuŝante sur la lito dum tutaj monatoj, sed nenia rimedo estis trovita.

La sekvintan jaron, kiam la grajnoj maturiĝis la tuta regiono fariĝis orkolora. Mihaguj tiel avidis, ke de mateno ĝis nokto ŝi gardis ĉe la enirejo de la remparo, kun vipo en la mano, timante, ke al alies hejmoj flugas la grajnoj.

Unu tagon, kiam ĵus tagiĝis, la grajnoj alflugis. Kaŭrante ĉe la pordo, Mihaguj flaris la bonodoron

*Unu el la nacimultoj en Ĉinio loĝanta ĉefe en Junnan-provinco.

de la grajnoj. Ŝi tiel ĝojiĝis, ke ŝiaj lipoj ne povis kuniĝi kaj salivo elfluis sur la teron. Ŝi tuj riverencis kaj kapsalutis senĉese, petante al la grajnoj:

“O grajnoj! mi ja estas la plej laborema, flugu vi ĉiuj al mia hejmo! Mi atendadis vin tage kaj nokte ĉi tie!”

“Fi! vi mallaborema aĉulino!” respondis mal-favore la rizgrajnoj. “Neniu el ni volas iri al via hejmo.”

Mihaguj ekkonfuziĝis de tiuj vortoj. Ja anstataŭ plenumi ŝian peton, la grajnoj eĉ ŝin riproĉis. Ŝi fariĝis tiel kolerega, firme tenante per la dentoj siajn longajn harojn defalintajn, ŝi ekskurĝis la grajnojn. Kaj “klak, klak” rompiĝis la flugiloj de la grajnoj, kiuj post baraktado unu post la aliaj returniris al siaj hejmoj — la kampoj. De tiam, ne plu flugis la rizgrajnoj.

Post tiu okazaĵo, ĉiuj en la regiono tre miris: Kial ne alflugis la rizgrajnoj ĉijare? Iuj diris, “Certe pro tio, ke ni forgesis oferadon al la ĉielo ĉe nia manĝado, kaj per tio ofendis la ĉielon. Ni do rapidu oferi rizon al la ĉielo!” Aliaj diris, “Tio montris ke perdiĝis al la rizgrajnoj iliaj animoj. Nur ripetu por ili la sanktan sutron kaj revoku la animojn, ili certe denove alflugos.” Sed iu junulo ne samopiniis kun la aliaj.

“La flugiloj de la grajnoj estis skurĝ-rompitaj de Mihaguj,” li diris. “Tiu-matene, mi ellitiĝis frue ĉe tagiĝo por ĉasi sur la montoj. Kiam mi atingis la pordon, subite mi aŭdis ploron kaj kriojn. Ekrigardante, mi trovis, ke Mihaguj skurĝis la grajnojn ne lasante ilin enflugi. Koleriĝinte mi intencis alsalti por ŝin kapti, sed ŝi forkuris kaj mi nur deŝiris de ŝi unu orel-ringon.” Finparolinte la junulo elprenis el sia poŝo belan orel-ringon. Efektive ĝi estis de Mihaguj. Sciiginte pri la vera kialo de sia malfeliĉo, ĉiuj tre indignis.

Kiam Mihaguj forkuris al la hejmo, ŝi paliĝis de kolerego longe ne povante elbuŝigi eĉ solan vorton. Retrankviliĝinte, ŝi ĉirkaŭprenis la kruron de la patriarko, plendante, ke kiam ŝi sin distris ekster la remparo, iu junulo volis ŝin ofendi en ŝia soleco, nur subtenate de ŝia lojaleco al la patriarko, ŝi sukcesis finfine sin liberigi post energia baraktado. Ŝi petis mortpuni la junulon, kiu ŝin ofendis.

La absurda patriarko tuj arestigis la junulon sen esplorado. Kaj post solida skurĝado al la junulo, li kondamnis la lastan al senkapigo. Nur dank’ al insista petegado de la tuta loĝantaro kun promeso ke ĉiu familio ĉiujare kontribuos al li 30 dekalitrojn da greno kaj naŭ ĉasajoj, la junulo

estis pardonita kaj kvietiĝis la kolero de la patriarko.

Jaroj pasis, Mihaguj fariĝis ĉiam pli kaj pli grasa, kun kapo ronda kiel kukurbo kaj korpo peza kiel elefanto. Kaj ŝi fariĝis ĉiam pli mallaborema. Ankaŭ la patriarko sin okupis nur por akcepti kontribuojn kaj tute ne laboris. Ĉiutage ili drinkis, manĝegis kaj sin amuzis de mateno ĝis vespero.

Iun tagon, kiam la vetero estis varmega, Mihaguj sidis ekster la domo por ĝui malvarmetan aeron; eĉ manĝi ŝi ne emis pro la varmego. Ŝi plendis al la patriarko: “Kiel domaĝe, ke tiel grandaj estas la rizgrajnoj, ke mi devas ilin maĉadi. Al mi eĉ laciĝas jam la dentoj antaŭ ol mi satiĝas. Kiel bone estus, se por manĝado ne necesas maĉado! Ĉu via patriarka moŝto, povas fari ion pri tio?”

“Tio estas facila! Tre facila!” respondis la patriarko, kiu pensis nenion alian ol akiri plaĉon de Mihaguj. “Ni nur pecetigu ilin.” Tiel li distristis la rizon per ŝtona pistilo.

El la pecetitaj rizsemoj kreskis en la kampoj rizo malgrandgrajna. Tiel la rizgrajnoj de la tuta regiono fariĝis malgrandaj. Kiam la popolo eksciis, ke la malbono devenas de Mihaguj, ili ĉiuj petis la patriarkon ŝin forpeli. Sed la patriarko ne konsentis kaj defendis ŝin pledante. Tiam la junulo, kiu suferis skurĝadon pro kalumnio de Mihaguj, ne plu povis deteni sin pro kolerego, kaj saltis el la amaso, mortbatis ŝin per unu terura frapo de sia pugno.

Translokigi montojn kaj krei marojn

Skulptis la Skulpta Fabriko de Ĉinio



La Maj-kvara Patriota Movado

.La kuranta jaro estas la 40-a datreveno de la fama "Maj-kvara" patriota movado en la moderna historio de Ĉinio. Ĝi donis profundan influon al la politiko, kulturo kaj pensmaniero en Ĉinio. Prezidanto Maŭ Ze-dong tre alte ĝin taksis en sia verko "Pri Nova Demokratismo", verkita en 1940. Por rememorigi tiun gravan movadon, jene ni koncize ĝin konigas al niaj legantoj.

La Red.

La revolucio en 1911 gvidata de Sun Jat-sen renversis la reĝimon de feŭd-monarkio, kiu ekzistis en Ĉinio dum pli ol du mil jaroj. Sed post la revolucio, la ĉinaj feŭdaj fortoj ankoraŭ konservis sian regantan pozicion kaj ankaŭ la imperiismo siajn privilegiojn en Ĉinio. La "Maj-kvara" movado montris ke la ĉina demokratia revolucio kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo transiris en novan etapon.

Eksplodo de la Movado Dum la Unua Mondmilito, la ĉina militarista registaro sekvante Usonon, Japanion k.c. imperiismajn potencojn, sin enmiksas en la militon kaj sendis post la milito ankaŭ sian delegitaron al la "Pariza Packonferenco" okazinta en 1919. Sub la premo de la popolo, la ĉina delegitaro postulis de la konferenco redoni al Ĉinio la rajtojn forrabitajn de Japanio el la manoj de Germanio en Ŝandong-provinco dum la milito, nuligi la kontrakton de 21 artikoloj inter Japanio kaj Juan Ŝi-kaj-a registaro, kiu humiligis kaj kompromitis Ĉinion, kaj nuligi la privilegiojn de la imperiistoj en Ĉinio. Tamen, la imperiismaj landoj jam aranĝis "interkonsenton" kun Japanio. manipulis la konferencon, kontraŭracie rifuzis la justajn postulojn de la ĉina popolo.

Ĉi tiu novaĵo veninte en Ĉinion, tuj vekis furiozan kontraŭstaron de la tuta popolo. La 4-an de majo, pli ol 5,000 Pekinaj studentoj levante la standardon de patriotismo kolektiĝis antaŭ Tian-an-pordego, kaj manifestaciis. Ili kriegis: "Ekstere ni batalu por naciaj rajtoj; interne ni punu la naciperfidulojn!" "Redonu al ni Ŝandong-provincon!", "Rifuzu subskribon sur la packontrakto!", "Nuligu la kontrakton de 21 artikoloj!" "Bojkotu japanajn varojn!"

La manifestacianta popolamaso unuanime postulis punon al tri perfiduloj: Caŭ Ĵu-lin, tiama ministro de komunikado, Lu Ĝong-ju, ĉefdirektoro de monfabrika buroo kaj Ĝang Ĝong-hiang, ministro al Japanio. Ili trarompis la baradon de armitaj soldatoj kaj policanoj, sturmis en la loĝejon de Caŭ, kaptis kaj batis Ĝang-n, kiu tie sin kaŝis. Ili ankaŭ forbruligis la domon de Caŭ. La Pekina militarista registaro elsendis grandan

nombro da soldatoj por subpremi la patriotan movadon de la popolamaso kaj arestis multajn studentojn. La duan tagon, por doni decidan proteston, la Pekinaj studentoj okazigis ĝeneralan strikon. Ili organizis ligojn de Pekinaj studentoj, cirkuligis propagandajn flugfoliojn kaj alvokis la tutan landon leviĝi por la batalo.

Baldaŭ estiĝis grandaj manifestacioj de la studentoj en urboj: Tiangin, Ŝanhajo, Nankino, Vuhan kaj Kantono, ili unuanime respondis per siaj agadoj al la patriota batalo de la Pekina studentaro. Miloj da laboristoj de Ginan, en Ŝandong-provinco ankaŭ kunvenis alvokante bojkoton kontraŭ japanaj varoj. Tajdo de patriota indigno leviĝis tra la tuta lando.



El Ĉinaj Fabloj:

Orangutangoj

En valo de la Sudo orangutangoj ofte vivis kune en aro de kelkdeko. Ili ŝatis trinki vinon, kaj des pli ŝatis imiti agon de homoj. Sciinte ilian kutimon, homoj ofte metas ĉe la vojo vinon aŭ vinfeĉon, apud kiu oni ankaŭ metis multajn sandalojn ligitajn per ŝnuroj. La orangutangoj komprenis, ke tio estis aranĝita por tenti ilin. Ili do insultis, "Hm! Ĉu vi pensas, ke ni ne scias? Ni neniam estos trompitaĵ." Tial, ili vokante unu la aliajn, forturnis sin kaj foriris. Tamen, la vino estis tiel bonodora, ke ili ne volis forlasi; eĉ forlasinte, ili ankaŭ ofte returnen rigardis. Kiam ili vidis neniun, ili revenis; sed ili timis trompiĝon kaj ree forlasis. Fine, ili memkonsolis, "Lasu nin iom gustumi. Ne gravas, se ni ne ĝisebrie trinkos." Sekve, ili ĉiuj konsentis, kaj revenis trinki la vinon. Post ebriiĝo, ĉio estis forgesita, kaj ili metis la sandalojn kaj imitis piediradon de la homoj. Konsekvence, ili falis kaj estis kaptitaj de la homoj.

El "Tangaj"

Striko de Laboristoj La militarista registaro daŭrigis sian amas-areston de studentoj. Tio incitis pli grandan koleron de la tuta popolo.

La 3-an de junio, la popolo en Ŝanhajo okazigis mitingon alvokante ekagon kontraŭ la imperiisma invado per striko de laboristoj kaj komercistoj. La 5-an de junio Ŝanhaja laboristaro iniciatis grandan strikon, en kiu partoprenis pli ol dudek mil laboristoj el japan-posedaj ŝpinfabrikaj, Komerca Presejo k.a. Tion sekvis tuj la laboristoj ĉe maŝina, teksta, presa, trama, aŭtobusa kaj vaporŝipa entreprenoj. La patriota agado de Ŝanhaja laboristaro multe instigis la batalemon de la tuta popolo. Sub la standardo de patriotismo, la popolanoj de la tuta lando jam pli firme unuiĝis.

Tiutempe, la laboristoj de Tangŝan, Ĉang-hindian, Tiangin k.a. lokoj leviĝis kontraŭi al la invado de la imperiistoj. Strikoj eksplodis unu post alia en urboj Nankino, Hangĝou, Giugiang, Vuhan, Hiamen, Ginan kaj Anking. Reprezentantoj el provincoj Ŝandong, Hebej, Ŝanhi, Gianghi kaj Hubej sinsekve venis al Pekino kun peticioj postulantaj abolicion de la kontrakto de 21 artikoloj, kaj liberon de parolo kaj kunveno. La granda politika striko iniciatita de la ĉina laboristaro antaŭenpuŝis la movadon "Maj-kvaran", ke ĝi rompis la limon de la patriota batalo de la

intelektularo, kaj fariĝis vasta popolamasa batalado. Tio multe kontribuis al la venko de la movado.

La plua intensiĝo de la tutpopola batalado kontraŭ la imperiismo devigis la militaristan registaron en Pekino portempe bridi sian subpremado al la popolo, liberigi la arestitajn studentojn kaj eksoficigi la tri naciperfidulojn. Ankaŭ la ĉinaj delegitoj ĉeestantaj la packonferencon rifuzis subskribi la packontrakton kun Germanio. La patriota agado de la ĉina popolo skuis la tutan mondon, kaj malfermis novan, brilan paĝon en la historio de kontraŭimperiisma batalado de la ĉina popolo.

Disvolviĝo de Nov-kultura Movado La "Maj-kvara" movado ankaŭ estas granda radikala movado de kultura revolucio. Post la Oktobra Socialisma Revolucio, parto de la gvidantoj en la novkultura movado de Ĉinio akceptis la Marksismo-Leninismen. En la intelektularo de Ĉinio troviĝis aro da pioniroj kiuj ekposedas elementan scion de komunismo, kiaj Li Da-ĝaŭ,* k.a.

* *Li Da-ĝaŭ (1888—1927)*—profesoro de Pekina Universitato, unu el la fondintoj de Pekina Komunista Grupo, la primitiva organizo de Ĉina Kompartio.

Puto-rano kaj Marĥelonio

En malprofunda putu loĝis rano.

"Rigardu, kiel gaje mi vivas ĉi tie!" ĝi diris al granda ĥelonio el la maro. "Mi saltadas ĉe la putrando, kiam mi eliras, kaj ripozas por iom dormi ĉe brika muro de la putu, kiam mi revenas. Mi povas iri en la akvon restigante ekstere nur la kapon kaj la buŝon, aŭ promeni maleole profunde en malmola koto. Ranidoj aŭ krabidoj ne povas sin kompari kun mi. Mi estas mastro de la akvo kaj la putu. Kion alian mi ankoraŭ bezonas? Kial vi ne vizitadas la puton?"

Antaŭ ol la ĥelonio povis etendi la maldekstran piedon en la puton, lia dekstra piedo estis detenata de la putrando. Li tuj retiriĝis kaj ekrakontis al la rano pri la maro.

"Ĉu vi iam vidis la maron? Miloĵ da lioj* ne sufiĉas por priskribi ĝian vastecon kaj dek-miloĵ

da futoj ne sufiĉas por priskribi ĝian profundecon. En antikva tempo, diluvo okazis en naŭ jaroj el dek, sed la akvo en la maro ne pliiĝis. Poste en sep el ok jaroj estis sekeco, sed la maro ne malpliiĝis. Evidente, nek diluvo, nek sekeco povas ŝanĝi la maron. Vivi en la senlima maro ja estas vera ĝojo!"

Tion aŭdinte la rano de la malprofunda putu silentiĝis de surprizo kaj iom da humiliĝo.

— El Ĝuangzi



* 1 lio = duonkilometro

Li Da-ĝaŭ ĝuste analizis la karakteron de la Unua Mondmilito kaj montris, ke tiu ĉi milito estis farita de la imperiismaj landoj por la intereso de la kapitalistoj, estas milito maljusta. Laŭ li, el la Mondmilito rezultis ne la venko de la imperiismaj landoj, sed venko de la ideo paco, de socialismo kaj de la nova tajdo de la 20-a jarcento. Lia argumento skuis la tiaman intelektularon de Ĉinio.

Por vaste propagandi Marksismo-Leninismom, krom kontribuado de artikoloj al la "Nova Junulo", tiama gazeto fama pro ĝia propagando de novkulturo, Li Da-ĝaŭ iniciatis eldonon de "Ĉiu-semajna Revuo" ĉe la fino de 1918, en Pekino, kun Ĉen Du-hiu** k.c. por konigi la novan konstitucion, agraran leĝon kaj leĝon de geedziĝo de Sovetrusio.

En majo de 1919, Li Da-ĝaŭ aperigis artikolon "Mia koncepto pri Marksismo" en la gazeto "Nova Junulo", rudimente konigis al la legantoj la teorion de Marksismo. La gazeto fariĝis la plej influa en propagando de Marksismo.

Post kiam eksplodis la "Maj-kvara" patriota movado, kun ĝi kunfluis la nova kultura movado, kiu dank' al tio ĉiuflanke disfloris. Kiel fungoj post pluvo, gazetoj por propagandi la novan kulturon aperadis unu post alia, en ĉiuj lokoj de la lando: Maŭ Ze-dong iniciatis eldonon de "Hiangkiang Revuo" en Hunan-provinco, Ĝoŭ En-

** Ĉen Du-hiu (1879—1942)—Unu el la gvidantoj de Ĉina Kompartio en ĝia frua tempo, sed poste fariĝis perfidulo.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

Fluigo de suda akvo al la nordo

Por fluigi la akvon en suda Ĉinio al la nordo, oni tuj komencos sciencajn esplorojn kaj studojn en la okcidenta regiono, kie devenas la fontoj de ĉinaj grandaj riveroj.

Ĉinio estas unu el la landoj riĉaj je akvofluoj. Laŭtakse la akvofluo surtera superas la tutan bezonon de la irigacio, kulturado de virgaj teroj, arbokulturo, bestobredado, industrio kaj navigacio. Sed pli ol tri kvaronoj el la akvofluoj kaj akvopovo kuŝas en la baseno de Jangzi-rivero kaj regionoj sude de ĝi t. e. en la meza kaj suda partoj de Ĉinio. Tial estas granda bezono translokigi la akvon en la nordan kaj nord-okcidentan partojn por la agrikulturo kaj ekspluatado de la naturaj fontoj tieaj.

Ekde 1951 oni jam komencis la esploron kaj studon en la regiono de 5,000 kilometroj laŭlonge de Jangzi-rivero, supre de ĝia branĉo Tongtian-rivero en King-haj-provinco ĝis Jangĝoŭ en

Giangsu-provinco malsupre, pri akvokonduko el Jangzi-rivero al la nordo kaj nordokcidento de Ĉinio.

En 1958 oni etendis la esploradojn sur Tibetan Altebenon kaj prezentis kelkajn projektojn. Estos finita en la kuranta jaro la esplorado koncerne al fluigo de la akvo de Jangzi-rivero, la plej granda rivero en la meza parto de Ĉinio, en la Flavan Riveron, la plej granda rivero en la norda. Dume koraenciĝas jam la esploraj laboroj por la estonta 2,300 kilometra Granda Kanalo de Kantono ĝis Pekino.

Subtera maro trovita

En septembro de 1958 studentoj kaj profesoroj de la geologia fakultato de Nankina Universitato trovis vastajn akvoriĉajn "subteran maron" kaj "pratempan riverliton de la Jangzi-rivero", en Orienta Ĉinio. Post pli ol duonjara detala esplorado, ilia situacio kaj amplekso jam fariĝas pli kaj pli klara.

La "subtera maro" etendiĝas

en provincoj Giangsu, Anhuĵ kaj Henan. Kaj ĝi dividiĝas en du partoj: Unu parto sub la ebena de Giangsu-provinco. La plej granda profundeco atingis pli ol 400 metrojn. El borita puto kun mezgranda kalibro ĝi povas liveri 1,000-2,000 tunojn da akvo ĉiutage, ĉe la plej bonaj kazoj eĉ 5,000 tunojn. Alia parto situas sur la ebena norde de Huaj-rivero, t. e. en la provincoj Anhuĵ kaj Henan. Ĝia plej granda profundeco atingas proksimume 300 metrojn.

"Pratempa riverlito de Jangzi-rivero" situas norde de la nuna en Giangsu- kaj Anhuĵ-provincioj, kun profundeco de 50 ĝis 120 metroj, kaj larĝas meze ĉirkaŭ 2 kilometrojn. Ĝi povas liveri ĉiutage 1,000-2,000 tunojn da akvo.

Eltrovo de tiuj du riĉaj akvofontoj donos grandan novan naturan riĉaĵon al la agrikulturo kaj industrio en la regiono de Orienta Ĉinio. Multaj fabrikoj en tiu regiono jam komencas profiti tiun riĉaĵon.

laj redaktis la "Bultenon de la Studenta Unuiĝo" en Tiangin kaj oni eldonis la gazetojn "Junula Ĉinio", "Nova Tajdo" en Pekino, "Semajna Revuo" en Ŝanhajo "Ĝegiang-a Revuo" en Hangĝou kaj "Dimanĉo" en Ĉengtu-o.

Post la "Maj-kvara" patriota movado, iom post iom vaste koniĝis en Ĉinio Marksismo-Leninismo, kaj libroj pri Marksismo-Leninismo komenciĝis esti tradukitaj en la ĉinan lingvon. Tio ebligis, ke la novkultura movado en Ĉinio grandpaŝon antaŭen saltis.

Historia Signifo de "Maj-kvara" Movado La "Maj-kvara" patriota movado estas naciliberiga movado decida kaj senkompromisa kontraŭ la imperiistoj kaj ankaŭ demokratia movado decida kaj senkompromisa kontraŭ feŭdismo.

La venko de la Oktobra Socialisma Revolucio ŝanĝis la aspekton de la homa historio, faris la ĉinan revolucion parto nedisigebla de la socialisma revolucio de la tutmonda proletaro. En la movado, la ĉina proletaro kun sia batalanta spirito suriris la arenon de politiko, kaj montris sian bravecon kaj malcedemon. La "Maj-kvara" movado turnis la ĉinan revolucion de malnova demokratio en la novan.

Samtempe, kaŭze de tiu ĉi movado, la pli kaj pli vastiĝanta ideo de socialismo helpis la ĉinan popolon ekkoni la ĉinan socion kaj la staton kaj eliron de la ĉina politiko, kaj sekve baldaŭ naskiĝis la partio de la ĉina proletaro—Ĉina Komunista Partio, surbaze de kunligado de la laborista movado kaj socialista ideo.

ANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

Ĉina sportisto atingis la Ĉampionecon pri tablotenis

Ĉina sportisto Ĵong Guo-tuan atingis, je la 5-a de aprilo individuan ĉampionecon en la 25-a tutmonda konkurso de tablotenis okazinta en Dortmund en okcidenta Germanio. Ĵong havas 21 jarojn. Tablotenison li ekamis kiam li estis 12-jara lerneĵano. En 1958 li konkeris la ĉampionecon en Ĉinio.

Ĵong Guo-tuan



Nova Mondrekordo de Pezlevo

35 minutojn post la 8-a horo laŭ Moskva tempo je la 14-a de marto en la kuranta jaro ĉina sportisto Ĉen Ging-kaj kreis novan mondrekordon de pezlevo de plumpeza klaso en la kon-

kurso por la Moskva Pokalo de internacia individua ĉampiono de pezlevo. La pezo, kiun li levis estis 148 kilogramoj. Per tio li rompis la rekordon de 147½ kilogramoj kreitan de Usona sportisto Issac Berger en septembro lastjare.

A. Mickiewicz koniĝita pere de Esperanto

Ĵus eldoniĝis en ĉina lingvo biografio de Adam Mickiewicz, unu el la plej grandaj poetoj de Pollando. Ĝi estas eldonita de la ŝtata faka eldonejo "Popola Literaturo" kaj tradukita de k-do Honfan laŭ Esperanta eldono de la verko de s-ro M. Jastrun, sub helpo de k-do Jan Zawada, vicprezidanto de Pola Esperanto-Asocio. La libreto enhavas 12 ĉapitrojn kaj 5 tutpaĝajn ilustraĵojn. Krome, troviĝas ankaŭ 47 klarigoj kaj mallonga noto pri la verkinto de tiu ĉi libreto. Notinda estas tio, ke sen Esperanta kunlaboro la traduko de tiu ĉi libro estus tre mal-

facila. Kiel diris en la komenco de tiu ĉi libro sen-scio de pola historio donas grandan malfacilon por kompreno de pola literaturo. Tion oni sentas des pli akre por kompreno al revolucia poeto kiel A. Mickiewicz. Sed por ebligi la aperon de tiu libro en ĉina eldono Pola Esperanto-Asocio kaj k-do Jan Zawada faris ĉion eblan. Krom la du aldonojn k-do Jan Zawada liveris abundajn klarigojn. Kaj dank' al tio fine la libreto aperis kaj ĉinaj legantoj povos plibone kompreni la grandan polan poeton. Tia estas plia ekzemplo por Esperanto en la kultura interfluo inter Ĉinio kaj Pollando.

ESPERANTO MARŜAS

Kluba vivo de Pekinaj esperantistoj

La 22-an de marto, okazis la regula studkunveno de Pekina Esperanto-klubo. Ĝin partoprenis 17 personoj, el kiuj estas tri gastoj: K-do J. Kiraly kaj lia edzino el Hungario kaj k-do Li Ke-hi el Ankang, Ŝenhi-provinco. Ĉiuj ĝojis en amikeca atmosfero, precipe pro tio, ke la antaŭa tago estis ĵus dediĉita al memorigo pri la 40-a datreveno de la Hungara Soveta Respubliko, en kies revolucia batalo partoprenis nia hungara amiko antaŭ 40 jaroj. Petite li parolis pri siatempa agado kontraŭ la malamikoj de sia patrolando kaj pri la ĝenerala situacio, precipe la milita operacio tiama. Lia persona travivaĵo donis al la aŭskultantoj vivecan bildon de la heroa revolucia batalado.

K-do Li Ke-hi faris ankaŭ tie informon pri sialoka E-movado. Ĉiuj miris je lia bona E-parolo, kiam li diris: "Tiu ĉi estas mia unuafoja parolo E-a antaŭ la publiko." La sekreto estas, ke li ofte praktikis E-an interparolon kun si mem kontraŭ spegulo. Li havas nur 6 kunlernantojn de E., pliparte el ili estas komencantoj, kies lernolibrojn li aĉetis nur ĉi tie okaze de lia vizito al la Agrikultura Ekspozicio en Pekino. Tio ja kuraĝigas ĉiujn E-komencantojn por pli diligenta praktikado de la lingvo.

K-do Venlo Fon, la kompilinto de la "Elementa Kurso de Esperanto" persone daŭrigis sian lecionon konversacian por la komencantoj baze de la libro kun plua sukceso.

Dume estis subskribitaj 3 leteroj de gratulado kaj saluto

al niaj gesamideanoj en Bulgario, Rumanio kaj DDR.

Dimanĉa kurso en Bengpu

Dimanĉa kurso de Esperanto en Bengpu de Anhuĵ-provinco komencita de la nova jaro regule daŭras. Ĝi dividiĝas nun en du kursojn, kaj unu el ili instruiĝas per rapida metodo. Lernas en ĝi kamaradoj kun fremdlingvaj scioj kaj la alia lernas iom malrapide. Unu el la lernantinoj Kin Hjue-ĥiang instruistino de Medicina Instituto en Bengpu jam komencas korespondadon kun Sovetiaj kamaradoj post nur unusemajna lernado. Multaj el la lernantoj ricevis korespondajojn el Svetio, Ĉeĥoslovakio kaj aliaj landoj.

Nova Vortaro Esperanta-ĉina

Jen nova vortaro finkompilita de Ĉina Esperanto-Ligo. Ĝi enhavas la tutan vortoprovizon de la Plena Vortaro de Esperanto kaj ĝia Suplemento. Troviĝas en ĝi ankaŭ ofte uzataj geografiaj nomoj kaj listo de Esperantaj mallongigoj.

Por ĉinaj tradukoj de la vortoj en la vortaro oni konsultis Plenan Vortaron E-Ĉinan de Fon kaj diversajn ĉinlingvajn fakajn terminarojn nove eldonitajn de la Ĉina Scienca Akademio. La eldonadon akceptis Komerca Presejo, granda entrepreno eldoninta multajn alilingvajn vortarojn. Espereble la vortaro eldoniĝos en kelkaj monatoj.

Esperanta Legolibro

Aperis en la fino de marto, kiel dua Esperanta eldonaĵo de

la Komerca Presejo, Pekino, "Esperanta Legolibro" kun ĉinaj klarigoj, kiu konsistas el humoraĵoj, fabloj, anekdotoj, paroladoj, poemoj kaj artikoloj pri socia movado, Esperanto kaj internacia lingvo. Ĝi estas rearanĝita el jam elĉerpita libro kompilita de k-do Tikos kaj estas destinita por progresantoj.

Saluto de Vietnamaj esperantistoj disaŭdigita en Ĉina Radiostacio

Pere de la Vietnamia radiostacio "Voĉo el Vietnamio" kaj la Ĉina Centra Popola Radiostacio la Vietnamia Pacdefenda Esperantista Asocio sendis al nia ligo sonbendon kiel novjaran saluton de 1959 al ĉina popolo. Ĝi estis destinita por disaŭdigo en la novjaro. Sed pro malfruiĝo de la transsendado ĝi nin atingis nur antaŭnelonge. La Centra Popola Radiostacio tuj faris aranĝon kaj ĝin disaŭdigis en Esperanto je la horo 11.45—12.30 de la 17-a en majo. Ĝi enhavas jenajn programerojn: Lermontov: La blanka velo (el Sovetio); Aŝada Iŝiji: O, ne plu atombombo (el Japanio); Vireto en la arbaro (popola kanto el Belgio).

Nova Esperanta Revuo aperos en Vietnamio

Laŭ informo el Vietnamio baldaŭ aperos Esperanta revuo "Vietnamio Antaŭen-marŝas". Ĝi estas trimonata kultura revuo, informanta la progresojn de nova Vietnamio. Jarkotizo de la revuo estas 3 rubloj aŭ \$ 0.75, abonebla ĉe 32, Hai Bá Trung, Hanoi, Vietnamio.

Ni sincere gratulas la aperon de tiu frata revuo, kiu kompreneble bone koniĝos la vietnaman popolon al la legantoj kaj per tio

Fondigis Korea Esperanto-Asocio

Laŭ informo el Korea Demokrata Popola Respubliko, fondiĝis la Korea Esperanto-Asocio la 11-an de aprilo, en Pjengjang. La nove fondita asocio difinis kiel siajn taskojn: disvastigi Esperanton en Koreio. akceli interamikiĝon kaj kulturan interŝanĝadon inter korea kaj alilandaj popoloj pere de Esperanto kaj utiligi la internacian helpan lingvon en informado al la mondo pri la socialisma konstruado de Koreio kaj en defendado de mondpaco.

Dektrimembra komitato estis elektita en la fondiĝa kunveno. Inter estraranoj troviĝas k-do Song Bong-uk, Financa Ministro de K.D.P.R. (prez.), prof. Gim Baj-zun, rektoro de Pjengjang-a Medicina Universitato (vicprez.) kaj k-do Sin Go-song, drama verkisto kaj direktoro de Ŝtata Teatro de Nacia Arto (vicprez.).

Ni sendas al nia frata asocio niajn plej varmajn salutojn kaj sincerajn bondezirojn. Saluton oni adresu al Korea Esperanto-Asocio, P.O. Kesto no. 16, Pjengjang, Koreio.

multe kontribuos al la paco kaj al la interamikiĝo inter vietnama kaj aliaj popoloj.

Renkontiĝo de Esperantistoj dum la VII Monda Junularfestivalo

La 28-an de julio 1959, en la kadro de la VII Festivalo, okazos en Vieno (Aŭstrio) renkontiĝo de junaj esperantistoj.

La programo de la Festivalo estas tre riĉenhava kiel ankaŭ tiu de la Esperanta renkontiĝo. Tamen dependas de la esperantistoj mem, ke ili faru ankoraŭ pli riĉan kaj interesan programon. Sendu al ni viajn proponojn kaj sugestojn.

Ni ankaŭ ĝoje salutos tiujn esperantistojn kiuj traveturante al la 44-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio (1-8 aŭgusto) haltos en Vieno.

Anoncu vian partoprenon al Preparkomitato de la VII Festivalo

“Esperanto”, Wien I, Seilerstätte 15, Aŭstrio.

Ili kunvenadas dufoje ĉiusemajne, Rostovaj Ĵurnaloj ofte presas la informojn pri la porpaca peresperanta laboro.

(Viktor)

Utiligo de E-korespondadoj

Tjevska radio-stacio en USSR ĉiumonate disvastigas ruslingve kaj udmurtlingve revuojn el leteroj de eksterlandaj korespondantoj, kiujn ricevas esperantistoj el urbo Tjevsk. Unua revuo rakontis pri batalo por paco en la tuta mondo.

Sendu Esperantajn verkojn!

La pola gazeto ‘Kulisy’ publikigas Esperanto-angulon sub la gvidado de k-do mag. fil. Mieĉslav Zgorzewski. La redakcio de tiu grava gazeto kun eldonkvanto de 300 000 ekz. konsentis pligrandigi la rubrikon, kondiĉe ke la prezentata materialo estu interesa. Tial la redaktoro de la fako petas la esperantistojn el la tuta mondo alsendi interesajn mallongajn artikolojn, informojn pri la Esperanto-movado kaj pacmovado kaj korespondancojn. Ĉion al Mag. fil. Mieĉslav Zgorzewski, WROCLAW 2, skrytka pocztowa 22, Pollando.

(Mieĉslav Zgorzewski)

El Rostov de Sovetio

Esp-movado bone kreskis en Rostov: nun en tiu urbo estas pli ol 100 geesperantistoj. Multaj el ili jam scipovas paroli en la lingvo. Nun ĉe Rostova Domo de Sciencistoj funkcias 2 parolgrupoj, 1 supera grupo por scienca studo de la lingvo, 3 elementaj grupoj por la komencantoj.

Esperanto Sekcio ĉe Rostov-Dona Domo de Sciencistoj





SUR NIA LIBROBRETO

Junularo de Bulgario — Ĵus ni ricevis la unuajn tri numerojn de tiu ĉi gazeto eldonitajn en 1958. Ilin traleginte kun granda admiro mi devas konfesi ke post la unika kaj de ĉiu admirata revuo "Nuntempa Bulgario" niaj bulgaraj kamaradoj kreis novan imitindan ekzemplon. Kiel la titolo montras, la revuo estas porjunulara, precipe servanta kiel interligilo kun junularo de aliaj landoj. Ĝin redaktas kaj eldonas la Centra Komitato de Dimitrova Asocio de la Popola Junularo, en Bulgario. La formato (21 × 28 cm) kaj la aranĝo estas plaĉaj. Okulfrapas speciale la riĉaj ilustraĵoj. La varieco de la enhavo, la viveco kaj al-

logeco de la priskriboj kaj rakontoj donas ĉiam intereson al la legantoj. En la artikoloj oni vidas kvazaŭ propraokule, kiel la junuloj de diversaj landoj ĝuas la belan naturon de Bulgario, kiel la bulgaraj junuloj batalas kun verveco por la konstruado de socialismo, kiel multkolora kaj ĝoja estas la vivo de bulgaraj junuloj kaj kiel viglas la Esperanta movado inter la junuloj. Plie la revuo ja ne sin limas en la kadro de junuloj. Ĝi konigas al la legantoj ankaŭ valorajn sci-ojn pri Bulgario. En la rubriko "Ĉu vi konas Bulgarian?" oni legas vere impresan artikolon. Ili ĉiuj tiel bone rakontas koncernan fakton kaj pri la nuna

stato kaj pri la historia evoluo, ke la leganto kvazaŭ kondukate de la artikolo suriras iun altaĵon kaj de tie li ricevas klaran panoramon de la temo. La lingvo fluas. Sole pliboniginda estas tio, ke en kelkaj lokoj oni renkontas neologismojn neklari-gitajn. (Honfan)

Esperanta Antologio. Poemoj 1887-1957, redaktita de William Auld, eldonita de Stafeto, J. Régulo Pérez, Apartado 25. La Laguna, Tenerifa, Kanariaj Insuloj, 16 × 22 cm. 648 p., prezo: broŝurita 3.60 us. dol.; tolbindita 4.20 us. dol., aŭ egalvaloro, plus sendkostoj.

Estas vere salutinda la apero de tiu ĉi antologio, kiu ampleksas je 648 paĝoj kaj enhavas pli ol 350 poemoj de 90 poetoj el proksimume 35 landoj de ĉiuj kontinentoj. Dank' al la fortostreĉa laboro de la redaktoro kaj eldonisto, la esperantistoj nun

Chang Chi-cheng

"Nuntempa Bulgario" pli koloriĝas

VENIS la unuaj du numeroj de Nuntempa Bulgario de la kuranta jaro kaj mi kun granda plezuro ilin tralegis.

En la unua numero mi unue legis la rakonton "La 'Revenĝo' de la Komunisto" kaj la raporton pri la laboristino Ivanka Mirĉeva. Ilin finleginte mi estis tre kortuŝita, kvazaŭ ili rakontas ion ne malproksiman de mi sed al mi tre familiaran. Mi sentas, ke tiu bonkora kaj iom post iom konsciiĝinta Dona (la heroino de la rakonto) ne estas iu fremdulino sed unu el la kamparaj virinoj en mia propra lando. Kaj tiu Ivanka, la iam malfeliĉa servistino kaj nun inĝeniero kaj parlamentano, ŝajnas al mi ankaŭ estas iu ĉina laboristino, kiun mi bone konas. Bulgario estas lando tre malproksima de ni, tamen la bulgara popolo preskaŭ havas la saman sorton kiel ni. Same kiel ni, ili terure suferis kaj obstine batalis sub la jugoj de la fremdlandaj kaj enlandaj regantoj; kaj nun ili liberiĝis, por si mem entuziasme laboras kaj feliĉan vivon ĝuas.

Kompreneble, pri tio mi sciiĝas ne ekde nun pro la informoj de *Nuntempa Bulgario*. Tamen mi sentas, ke mia kompreno, simpatio kaj amo al la bulgara popolo despli profundiĝas post kiam tiu Esperanta gazeto prezentas antaŭ miaj okuloj la ĝemojn, sopirojn, plorojn kaj ridojn de miaj gefratoj en Bulgario. Ĉinio kaj Bulgario ambaŭ estas socialismaj landoj, ili nomas unu la alian frata lando; ĉinoj kaj bulgaroj do interrilatiĝas kiel fratoj. Kaj mi povas konstati per mia propra sperto, ke pere de nia kara lingvo, ni pli intime interfratiĝas.

Ankaŭ multajn aliajn artikolojn el la diritaj numeroj mi legis, kaj mi trovis ke ili estas ege interesaj kaj valoraj. Speciale plaĉas al mi la felietono de Ilija Kiuljovski "Konkorda Anaro", la artikoloj sub la temo "Per la rigardo de la Alilandanoj" kaj la informo pri la "palaco de la bulgara libro".

havas la eblecon konatiĝi kun la sufiĉe riĉa Esperanta poezio, kiun la esperantistaj verkistoj kontribuis dum la pasintaj jardekoj.

Krom la antologio mem, tiu dika volumo enhavas enkondukon kaj postnoton de la redaktoro kaj ankaŭ glosaron, notaron kaj biografiojn. Tio plene montras la seriozecon, zorgemon kaj entuziasmon de la redaktoro en lia laboro, kaj pro tio la legantoj ŝuldas al li multe.

La redaktoro klasigis la verkojn en tri kategoriojn, nome, primitiva romantismo, polurita romantismo kaj metafiziko. Ni dubas, ĉu tia klasigo estas ĝusta kaj preferinda. Eble estas konsilinde, ke en kompilado de tia volumo kia la Antologio oni nur kronike envicigas la verkojn.

Sepdek jarojn travivis la lingvo Esperanto kaj ĝia literaturo. Versajne jam estas tempo por ni trarigardi kaj revui nian literaturon kreskintan en la pasinteco,

kaj el ĝi ĉerpi tion, kio estas valora kaj utila. Tiucele la Antologio povas bone servi al la esperantista publiko. (Ĉen)

Angla Antologio, 1000-1800. Redaktoroj: William Auld kaj Reto Rossetti. Enkonduko de Marjorie Boulton. Eldona Fako de UEA. 320 pp. Bindita. Prezo 10 ned. guld.

Unu el la laŭdindaj tradicioj en Esperanto estas la "antologiado" de naciaj literaturoj. Dank' al tiu laboro ni havis la ŝancon ĝui la literaturan kreitaĵon de multaj malproksimaj popoloj. Dum la tridekoj de la nuna jarcento ni ofte legis kun granda avido antologiojn ĉu ĉeĥoslovakaj, ĉu hungaraj, ĉu svedaj, kiam ajn ili aperis. Sed bedaŭrinde la valora laboro jam interrompiĝis por longa tempo. Jen Angla Antologio! Vere aprobinda rekomenco, pro kiu la iniciatoroj devas esti salutataj.

La redaktoroj de la antologio

estas prave ambiciemaj, intencante enhavigi en la amplekso de tricent kaj kelkaj paĝoj la reprezentantajn specimenojn de angla literaturo de okcent jaroj. Oni trovas en la listo de aŭtoroj la nomojn de Geoffrey Chaucer, Thomas Wyatt, Edmund Spenser, Christopher Marlowe, William Shakespeare, John Milton, Daniel Defoe, John Dryden, Alexander Pope, William Black, Francis Bacon, Johnathan Swift kaj Henry Fielding. Por ĝuste reprezenti ilin estas neeviteble renkonti malfacilaĵojn. Kaj malfacilaĵo sin montras. Ekzemple, Shakespeare estas reprezentita nur por du fragmentoj el "Romeo kaj Julieta" kaj "Julio Cezaro" — ambaŭ tragedioj. Kaj Henry Fielding, mondfama romanisto, okupas spacon de nur kvin paĝoj! Jes, por akriĝi la guston de la leganto, la specimenoj sufiĉus. Sed por adekvate komprenigi al la leganto la profundan hu-

Certe, kiel esperantisto, mi multe interesiĝas pri la Esperanta rubriko de la gazeto, kaj mi opinias, ke la pligrandiĝo de ĝia spaco estas vere salutinda. Kun granda atento mi legis la artikolojn "Zamenhof kaj la litova lingvo" kaj "Pri la duspeca sintaksa funkcio de la adverbparticipa formo", kaj mi konsideras ilin tre utilaj por esperantistoj. Mi kredas, ke la altvalora esperantaĵo, kiu, mi esperas, multe aperos en la venontaj numeroj de la revuo, sendube allogas multajn esperantistojn kaj varbas al ĝi despli multnombre da seriozaj legantoj.

Kompare kun la 1957 kaj 1958 jarkolektoj de la gazeto, la novaj numeroj montras okulfrapan progreson. Ĝi marŝas paŝon antaŭen, kaj la paŝo farita ja estas tre granda. Oni konstatas, ke la gazeto multe pli koloriĝas; ĝi koloriĝas ne nur frontpaĝe sed ankaŭ internapaĝe, kaj ĝi pli koloriĝas ne nur aspekte sed ankaŭ enhave.

Ni elkore dankas kaj salutas niajn bulgarajn kamaradojn, kiuj per sia sindona laboro multe kontribuas al nia movado ĝenerale kaj al tiu ŝatinda Esperanta revuo speciale. Ja estas unika en la Esperanta gazetaro tia belega kaj altvalora revuo kia "Nuntempa Bulgario", pri kiu la tuta esperantistaro devas fieri kaj per ĉiuj rimedoj ĝin subteni, ĉar ĝi estas Esperanta gazeto ne nur de la bulgaraj esperantistoj sed ankaŭ de ni ĉiuj.



manismon kaj socian konscie-
ncon, kiuj karakterizas la re-
alismajn verkadojn de grandaj
anglaj verkistoj, la elektitaj
pecoj ne ŝajnas tre kontentigaj.
La jam akrigita gusto postulas
ion plu. En tiu senco eble ne
estas sen justeco esperi, ke la
sekvontaj du volumoj aperu pli
baldaŭe?

La papero, preso kaj bindo
estas tre bonaj. (Y.C.C.)

Glumarko de 44-a U.K. 3.8 × 4.8
cm. En kvar koloroj. Unu folio
el 25 markoj kostas 0.25 u. dol.
(6 polaj zlotoj) ink. sendkoston.
Mendebila ĉe 44-a Universala
Kongreso de Esperanto, Varsovio,
Pollando, aŭ ĉe UEA.

Ĝi estas verko de unu el la
plej bonaj polaj grafikistoj. Por
diskonigi kaj sukcesigi la jubilean
kongreson ĉijaran ni rekomendas
al niaj legantoj amase aĉeti kaj
uzi la belan gm. en sia kores-
pondado.

**La Phu-Loi Masbuĉado en Sud-
vietnamio** — broŝuro 16-paĝa
eldonita de La Fremdlingva
Eldon-oficejo de Vietnamio, akuz-
anta la amasbuĉadon en Phu-Loi
Koncentrigejo en Sudvietnamio
regata de la kliko Usono-Zjem.
Ĝi enhavas tri dokumentojn pri
la krimo kaj alvoko de Vietnamia
Pacdefenda Esperantista Asocio.
Ĝi malkaŝas la kruelecon de la
Sudvietnama regantaro kiu in-
dignigas ĉiujn justamajn homojn.

Grajnoj en vento estas lerneja
organizo tutmonda, kies rondoj
tri-foje en la jaro — en marto,
junio kaj novembro — eldonas en
la nombro 20 ekzempleroj kaj en
la normigita komerca formato
21 × 29.7 cm. libere verkitajn
tekstojn kaj desegnaĵojn. Ĝi
disvastigas Esperanton ĉe la in-
fanoj kaj, kun la infanoj, kun-
laboras al frateco kaj paco en la
mondo. Skribu al ĝi, ĉu vi estas
preta kunlabori aŭ ĉu, eble, vi

konsentas fariĝi gvidanto de
nova rondo. Aldonu int. resp.
kuponon! Adreso: Grajnoj en
Vento, Marcel Erbeta, rue des
Pins 66, Bienne-Biel 7, Svislando.

Esperanto en la Festivalo Kiel
en la VI-a Festivalo en Moskvo
ankaŭ en la VII-a Festivalo en
Vieno troviĝos renkontiĝo de
junaj esperantistoj. Same por ĝi
eldoniĝas Esperanta organo
“Esperanto en la Festivalo”. Ĝus-
ni ricevis ĝian duan (martan)
numeron. En ĝi troviĝas alvoko
de la Prepargrupo por la renkon-
tiĝo de esperantistoj dum la
festivalo, artikoloj, informoj pri
preparaj laboroj de la festivalo
kaj interesaj karikaturoj pri
lingvaj baroj kaj Esperanto. Ĝin
eldonas Junulara Sekcio de Bul-
gara Esperanto-Asocio kaj Bul-
gara Esperanto-Festivala Grupo.
Oni povas ĝin ricevi per Esp-aj
libroj aŭ similaj. Ĉion adresu
al: P. K. 44, Sofia, Bulgario.

Korespondi deziras

* **Renka Popova**, str. Dobruĝa
11, Tirnovo, Bulgario, 54-jara
instruistino dez. kor. kun eks-
tereŭropanoj.

* Pri stenografio korespondas
speciale kun Aziaj kaj Afrikaj
landoj **Adolf Staĥura**, Táborská
42, Ostrava - Radvanice, Ĉeĥoslov-
akio.

* **P. M. Penevski**, 45-jara la-
boristo (tradukisto) dez. kor. kun
ĉinaj esp-istoj kaj interŝ. gaz.,
librojn, p.m. kaj p.k. Kor. dez.
ankaŭ liaj du knaboj 20- kaj 10-
jaraj. Adr.: kv. CERNO KON-
EVO, Dimitrovgrad, Bulgario.

* **Hristov Iv. Hristov**, str. Geor-
gi Dimitrov 120 B, Ruse, Bulgario,
laboristo, dez. kor. kun ĉinaj
geesp-istoj pri la vivo, moroj kaj
kutimoj, kaj interŝ. il. p.k.

* **Naray József**, Budapest, XIII.
Petnehazy u 34-36, Hungario,
dez. kor. kun ĉinaj, hindaj, ko-
reaj kaj vietnamaj esp-istoj.

* **Jordan Hristov**, str. P. D.
Petkov 16, Ruse, Bulgario, 17-
jara nova esp-isto dez. kor. kun
junaj geesp-istoj el Azio por
interŝ. p. k., p. m., gaz. ktp.

* **Esperanta rondeto en Bul-
gario**, Kazanlak, str. Tulovo, N.
1, dez. kor. kun ĉinaj ges-anoj
12—18-jaraj pri ĉiuj demandoj
kaj interŝ. p. m., b.k., f. ktp.

* **Ivan Denĉev Pomakov**, str.
Otec Pajisij 3, Ruse, Bulgario, 18-
jara lernanto dez. interŝ. p. m.,
b. k. eldonajojn kaj muziknot-
ojn por trumpeto kaj saksfono,
kun ĉinaj, japanaj kaj hindaj
ges-anoj.

* **K. Kalĉevski**, Veĉerna Gim-
nazio, Tolbuhin, Bulgario—prof.
de lit., fil. kaj rusa lingvo, serĉas
korespondantojn ĉinajn pri div.
temoj por si kaj siaj lernantoj.


* **Bulgara oficisto** dez. kor. ĉiu-
teme, tutmonde kaj interŝ. pres-
ajojn. Li proponas al siaj ĝisnu-

naj kaj estontaj gekor-antoj, faru
sian unuan renkonton en Varso-
vio dum la 44-a U. K. aŭg. 1959.
Skribu al: **Jordan D. Kalinov**,
str. Georgi Dimitrov 122, Ruse,
Bulgario.

* **Mihail I. Popescu**, Calea 13
Septembrif Nr. 65, Bucuresti 5,
Rumanio, dez. kor. kun ĉina
s-ano, kiu bonvolus helpi al li
en la lernado de la ĉina lingvo
laŭ simpligita skribsistemo
(latina alfabeto).

* **Estona esperantisto** dez. kor.
kun ĉinaj esp-istoj pri ĉiuj temoj.
Dez. ankaŭ interŝ. p.m. unuata-
ga-kovertojn, il. pk-ojn. **Uno
Nepp**, Taani 3, Tõrva, Estona
SSR, Sovetunio.

* **Sperta estona esp-isto** serĉas
seriozajn gekor-antojn en Ĉinio
pri literaturo, kulturo, scienco ktp.
Volonte interŝ. pk. unuataga-ko-
vertojn, il. pk. monerojn, poper-
monojn, librojn, esp-ajojn. **Lem-
bit Tangsoo**, Männiku M. Tõrva,
Estona SSR, Sovetunio.



RIĈA RIKOLTO
(DEKORACIAJ BARELIEFOJ)

Kolektiva verko de la
Ĉina Skulpta Fabriko

